Boris Godunov: dramo

Tümmel

Nurnbergo; XA-DXDE 1894

BIBLIOTEKO
DE LINGVO INTERNACIA
ESPERANTO.
FOLIOJ 11 kaj 12.

Nr. 75.

BORIS GODUNOV.

DRAMO
DE
A. PUŜKIN.

TRADUKIS EL LINGVO RUSA
V. DEVJATNIN.

KAJERO I.

NURNBERGO.
PRESEJO DE W. TÜMMEL.
1894.

BIBLIOTEKO
DE LA LINGVO INTERNACIA
ESPERANTO.

Nr. 75.



BORIS GODUNOV.

DRAMO
DE
A. PUŜKIN.

TRADUKIS EL LINGVO RUSA
V. DEVJATNIN.

NURNBERGO.
PRESEJO DE W. TÜMMEL.
1894.

Personoj:

Boris Godunov, reĝo de Moskvo.
Teodoro }
Ksenio } liaj infanoj.
Patriarko.
Vorotinskij }
Ŝujskij }
Puŝkin }
Semiono Godunov } bojaroj
Kurbskij }
Ĥruŝĉov }
Basmanov.
Ŝĉelkalov, sekretario de magistrato.
Mniŝek, pola vojevodo.
Marino, lia filino.
Viŝneveckij, pola grand-sinjoro.
Pimeno, maljuna monaĥo.
Grigorio, novico, — poste **Uzurpulo.**
Abato de Ĉudova monaĥejo.
Pastro Ĉernikova.
Karelo, Dona kozako.
Rusa kaptito.
Poeto.
Mastrino de drinkejo.
Varlaamo }
Misailo } vagistoj.
Du observistoj.
Nutristino de Ksenio.
Knabo de Ŝujskij (servanto).
Ruzja, servantino de Marino Mniŝek.
Frenezulo.

Bojaroj, monaĥoj, gardantaro, popolo, servantoj, servantinoj, polaj sinjoroj k. t. p.

Boris Godunov.

Dramo de **A. Puŝkin.**

Ĉambro en Kremlo (20 Februaro 1598).

Princoj **Ŝujskij** kaj **Vorotinskij.**

Vorotinskij. Ni estas rajtigitaj urbon gardi,
Sed, ŝajne, ni nenion havas fari:
Malplena — Moskvo, ĉar post patriarko
Al monaĥejo eĉ popol' ekiris.
Per kio, pensas vi, finiĝos ĉio?
Ŝujskij. Per kio? Tre facile estas scii:
Popolo krios kaj ankoraŭ ploros,
Boris ankoraŭ, kvazaŭ malsobrulo
Ĉe brando, eksulkiĝos tre malmulte,
Kaj, fine, dank' nur al favoro sia,
Humile preni kronon li konsentos,
Kaj poste — poste li komencos regi
Denove, ree.
Vorotinskij. Sed monat' jam pasis,
Dum li en monaĥejo kun fratino
Forlasis tute, ŝajne, mondan vivon.
Nek patriarko, nek bojaroj noblaj
Ĝis nun lin kun sukceso konvinkadis;
Aŭskultas li nek larmajn admonadojn,
Nek varmajn petojn, nek ploregojn Moskvajn,
Nek voĉon eĉ de Granda Konsiliĝo.
Fratinon lian oni vane petis,
Ke ŝi Boris'on benu por reĝado;
Je li simile, monaĥin'-reĝino
Fortika estas kaj neelpetebla.

Boris, videble, ŝin al tio igis.
Nu, kio estos, se reganto vere,
De zorgoj regnaj forte lacigita,
Ne prenos tute tronon senpotencan?
Vi kion diros?
Ŝujskij. Diros mi, ke vane
Verŝiĝis sango de infan'-reĝido, —
Kaj diros, ke Dimitrij povus vivi.
Vorotinskij. Terura estas krimo!.. Sed ĉu vere
Boriso pereigis lin?
Ŝujskij. Sed kiu?
Sed kiu Ĉepĉugov'on subaĉetis?
Kaj kiu ankaŭ sendis Bitjagovskij'n
Kun Kaŝalov? Ugliĉon tuj sendita
Sur lok' esplori tiun ĉi aferon,
Postsignojn freŝajn tie mi eltrovis:
Ja, tuta urbo estis atestanto,
Urbanoj ĉiuj tre konsente diris;
Kaj, reveninte, mi per unu vorto
Krimulon povus tute pereigi.
Vorotinskij. Kaj kial do vi lin ne pereigis?
Ŝujskij. Li, mi konfesas, tiam min konfuzis
Per sia aroganta trankvileco;
Li min rigardis tiam kvazaŭ prava:
Min pri detaloj multe li demandis, —
Kaj jen al li ripetis sensencaĵon
Mi tiun saman, kiun li deziris.
Vorotinskij. Malbone, princo.
Ŝujskij. Kion do mi farus?
Al Teodoro ĉion dirus eble?
Sed ĉiam ĉion aŭdis li kaj vidis
Per aŭdo kaj rigardo Godunova:
Se tute mi certigus lin je ĉio, —
Boriso lin je mala ekcertigus,
Kaj poste oni, eble, min forsendus
Kaj tiam, kiel ankaŭ mian onklon,

Min eĉ sufokus en malliberejo.
Ne fanfaronas mi, sed se okazus,
Nenia ekzekuto min timigus;
Mi — ne timulo, sed — ne malsaĝulo,
Kaj mi ne volas vane preni maŝon.
Vorotinskij. Terura estis krimo!.. Sed kredeble
Jam pento turmentadas mortiginton, —
Kaj certe sango de infan' senkulpa
Malhelpas lin, ke tronon li alprenu.
Ŝujskij. Transpaŝos; li ne estas tre timema!...
Honoro granda estos por Rusujo!
Tataro, sklav', bofrato de Maluto,
Krimulo, en anim' ekzekutisto,
Akceptos kronon, sceptron Monomaĥan!...
Vorotinskij. Ne glora estas li, — ni — multe pli!....
Ŝujskij. Mi pensas, jes.
Vorotinskij. Ja Ŝujskij, Vorotinskij....
Ĉu scias vi? naturaj estas princoj.
Ŝujskij. Naturaj, kaj devenas de Rjuriko.
Vorotinskij. Aŭskultu, princo, — ni ja havas rajton
Heredi Teodoron.
Ŝujskij. Eĉ pli multe,
Ol Godunov.
Vorotinskij. Ja efektive!
Ŝujskij. Vidu:
Se Godunov ruzadi ne forlasos,
Komencu ni popolon ekscitigi,
Foriru ili tute de Boriso:
Da princoj propraj ili multe havas
Kaj tial povas kiun ajn elekti.
Vorotinskij. Ni estas multaj, idoj de Rjuriko,
Sed estas van' batali kun Boriso!
De ni popolo tute malkutimis,
Forgesis, ke ni estas Rjurikidoj,
Ĉar longe ni jam restas sen provincoj
Kaj longe nur al reĝoj ni servadas, —

Sed li popolon tutan jam ensorĉis
Per amo, per timigo kaj per gloro.
Ŝujskij (rigardas fenestron). Kuraĝos li, sed ni . . . Silentu! Vidu:
Popolo iras reen en senordo, —
Ni kuru, kaj sciiĝu, ĉu jam fino? . . .

Ruĝa Placo.

Popolo.

Unua. Neelpetebla! Li de si forpelis
Bojarojn ĉiujn, pastrojn, patriarkon.
Malsupren ili tute vane falis;
Brilanta trono forte lin timigas.
Dua. Ho, Dio mia! Kiu nin regados?
Malĝojo estas!
Tria. Jen sekretario,
Eldiros li decidon magistratan.
Popolo. Silentu! Jen sekretario diras;
Aŭskultu! . . .
Ŝĉelkalov (sur Ruĝa perono). Granda Konsiliĝ' decidis
Ankoraŭ lastan fojon sin returni
Al malĝojega koro de reganto:
Denove morgaŭ sankta patriarko,
En Kreml' farinte plej solenan preĝon,
Antaŭirata per standardoj sanktaj,
Kun ĉiuj sanktfiguroj Dipatrinaj,
Ekiros, — kaj kun li bojaroj ĉiuj,
Nobeloj multaj, elektitaj homoj
Kaj loĝantaro Moskva ortodoksa, —
Ni ĉiuj iros kaj reĝinon petos,
Ke ŝi kompatu nian orfan Moskvon
Kaj ŝi Borison benu por reĝado.
Vi iru nun kun Dio viajn domojn
Kaj preĝu, — flugu al ĉielo sankta
Fervora preĝo de ortodoksuloj. —

(Popolo disiras.)

Knabina Kampo.

Nova-Knabina Monaĥejo. Popolo.

Unua. Eniris ili de reĝin' ĉambreton;
Boris eniris kaj bojaroj noblaj
Kun patriarko.
Dua. Kio do?
Tria. Ankoraŭ
Obstinas li; espero tamen estas.
Virino (kun infano). Ne ploru! Nu, silentu, ĉar vin lupo
Tuj prenos kaj formanĝos! Nu, silentu!
Unua. Ĉu ni ne povas trans barilon rampi?
Dua. Ho, ne! Malvaste estas eĉ en kampo,
Ne sole tie! Baroj kaj tegmentoj,
Etaĝoj ĉiuj de preĝeja turo,
Kupoloj ĉiuj kaj eĉ ĉiuj krucoj
Pleniĝis je popolo.
Tria. Estas bone!
Unua. Sed kia bruo estas?
Dua. Jes . . . Aŭskultu!
Popol' ekkriis; kvazaŭ ondoj falas
Popolaj vicoj . . . . jen ankoraŭ! Frato,
Jam nia estas vico: nu, genuu! . . .
Popolo (sur genuoj; krio kaj ploro).
Kompatu, nia patro! Nin potencu!
Ho, reĝu, patro!
Unua (mallaŭte). Kial oni ploras?
Dua. Ne scias mi! Bojaroj, eble, scias
Nur bone tion.
Virino (kun infano). Kial vi ne ploras?
Jam oni devas plori nun! . . . Jen lupo!
Ploregu tuj! (infano ploras.) Tre bone! . . .
Unua. Ĉiuj ploras —
Ni ankaŭ ploru.
Dua. Mi ne havas larmojn.
Ankoraŭ kio?
Unua. Ĉu mi povas scii! . . .

Popolo. Li prenis kronon! Tute li konsentis!
Li estas nia! Vivu, reĝ'-Boriso!

Kremlaj ĉambroj.

Boriso, patriarko, bojaroj.

Boriso. Ho, sankta patro kaj bojaroj noblaj!
Animo mia estas malkovrita:
Vi ĉiuj vidas, ke mi prenas sceptron
Kun granda timo kaj kun humilego.
Tre malfacila estas devo mia!
Heredas mi potencajn Iohanojn,
Heredas ankaŭ mi anĝelon-reĝon! . . .
Sanktulo vera, mia patr' potenca!
Ekvidu larmojn de fidelaj sklavoj,
Kaj sendu vi al tiu, kiun amis,
Kaj kiun tie ĉi vi ekaltigis,
Sanktegan vian benon por reĝado:
Ke regu mi popolon mian glore,
Ke estu mi kaj justa, kaj bonega.
Al mi vi helpu nur, bojaroj gloraj,
Kaj servu, kiel vi al li servadis,
Ankoraŭ kiam kune ni laboris
Por bono de popolo nia Rusa.
Bojaroj. Neniam ni je nia ĵur' perfidos.
Boriso. Nun iru kaj salutu ni jam ĉerkojn
De formortintaj potenculoj Rusaj,
Kaj poste — tutan vi popolon voku
Festenon fari, — voku tute ĉiujn:
Je ĉiuj mi senfine estos ĝoja.

(Li foriras, bojaroj ankaŭ.)

Vorotinskij (haltiginte princon Ŝujskij).
Divenis vi.
Ŝujskij. Sed kion?
Vorotinskij. Vi memoras?
Ne longe? . . .
Ŝujskij. Ne, nenion mi memoras.

Vorotinskij. Sed kiam ja popol' knabinan kampon
Ekiris . . .
Ŝujskij. Nun ne estas temp' memori;
Konsilas mi forgesi iafoje . . .
Cetere tiam per mallaŭdo ŝajna
Deziris mi nur vin malmulte provi,
Deziris mi ekscii viajn pensojn;
Sed jen popolo jam salutas reĝon —
Foreston mian povas li rimarki,
Mi sekvu lin. (Li foriras.)
Vorotinskij. Ho, ruza kortegulo!

Nokto. Ĉambreto en Ĉudova Monaĥejo.

(1603 j.)

Pimeno, Grigorio (dormanta).

Pimeno (skribas antaŭ sankta lampo).
Ankoraŭ unu lasta nur rakonto, —
Kaj mia jam kronik' finita estos;
Kaj mi plenumos devon, kiun Dio
Al mi ordonis. Dio min ne vane
Devigis longe tie ĉi vivadi
Kaj legi min kaj skribi ekinstruis:
Monaĥo ia laborema iam
Laboron mian tre fervoran trovos,
Bruligos, kiel mi, li lampon sanktan,
Kaj de kroniko polvon forskuinte,
Rakontojn miajn verajn li transskribos, —
Ke sciu idoj de ortodoksuloj
Pasintan sorton de patruja lando,
Ke reĝojn siajn grandajn rememoru
Por laborad', por bono kaj por gloro;
Kaj por pekado, por mallumaj krimoj
Humile Dion pardoneman preĝu.
En maljuneco mi denove vivas;
Pasinta ree antaŭ mi trapasas . . . .

Ĉu longe fluis ĝi, je agoj plena,
Ondante, kvazaŭ granda oceano?
Ĝi estas nun silenta kaj trankvila:
Malmulte da personoj mi memoras,
Malmultaj ankaŭ vortoj min atingas, —
Alia do — pereis senrevene!
Sed tago estos tuj, forbrulas lampo. . . .
Ankoraŭ unu lasta nur rakonto. (Skribas.)

Grigorio (vekiĝinte). Denove tio sama! Trian fojon!
Ho, sonĝo malbenita! . . . . Jen li sidas
Kaj ĉiam skribas antaŭ lamp', — videble
Okulojn tutan nokton li ne fermis.
Tre amas mi trankvilan vidon lian,
Precipe kiam pri pasintaj jaroj
Kronikon sian skribas li; mi ofte
Diveni provas, kion li priskribas:
Ĉu pri regad' malluma de tataroj?
Ĉu pri ekzekutadoj de Johano?
Ĉu pri popola brua konsiliĝo?
Ĉu pri patruja gloro? Tute vane!
Nek en rigardoj, nek sur lia frunto
Tralegi oni povas liajn pensojn;
Kaj ĉiam vid' — humila kaj majesta . . . .
Sekretario griza tiel same
Trankvile vidas kulpajn kaj senkulpajn,
Egale aŭdas bonon kaj malbonon,
Kaj nek kompaton, nek koleron scias.

Pimeno. Ĉu vi vekiĝis, mia frato?

Grigorio. Benu,
Min, sankta patro mia.

Pimeno. Dio benu
Hodiaŭ vin, kaj ĉiam, kaj eterne.

Grigorio. Vi ĉiam skribis kaj ne dormis tute,
Kaj mian koron longe pekaj revoj
Turmentis, kaj diablo min konfuzis.
Mi sonĝis, kvazaŭ per ŝtuparo kruta

Mi turon venis, — kaj de alta pinto
Ekvidis Moskvon, kvazaŭ formikejon;
Sur plac' malsupre estis multaj homoj, —
Kun rido ili ĉiuj min montradis;
Kaj mi timegis, kaj mi hontis kune, —
Kaj falis mi rapide kaj vekiĝis....
Tri fojojn tion saman mi sonĝadis.
Ĉu ne mirinde?

Pimeno. Juna sango ludas;
Per preĝo kaj per fasto kvietiĝu,
Kaj viaj sonĝoj je vidaĵoj bonaj
Pleniĝos. Jen ĝis nun ankoraŭ, ĉiam,
Se mi ne preĝas longe antaŭ nokto —
Ne dormas mi trankvile kaj senpeke:
Mi sonĝas tiam jen festenojn riĉajn,
Militistaron, jen batalojn bruajn, —
Amuzoj senprudentaj de juneco!

Grigorio. Junecon vian gaje vi pasigis!
Batalis vi sub turoj de Kazano,
Armeon Litvan iam vi rebatis,
Kortegon luksan de Johano vidis!
Feliĉa vi!... Kaj mi de knabaj jaroj
En monaĥejo, plej mizera, vivas!
Sed kial mi ne povas bataladi
Kaj festenadi en palacoj reĝaj?
Mi povus, kiel vi, en maljuneco
De mondo vanta tute min forigi
Kaj meti min trankvilan monaĥejon.

Pimeno. Ne plendu, ke vi frue pekan mondon
Forlasis, ke malmulte da tentaĵoj
Al vi potenca Dio sendis. Kredu:
Ensorĉas ofte gloro nin kaj lukso,
Kaj tre malica amo de virinoj.
En vivo mi per multa plezuriĝis;
Sed vere trovis mi feliĉon plenan
Nur kiam monaĥejon mi eniris.

Memoru, filo, vi pri grandaj reĝoj:
Pli alta kiu estas? Sola Dio.
Kuraĝas kiu kontraŭ reĝ'? Neniu.
Sed ofte ora krono ilin premas —
Anstataŭ ĝi kapuĉon ili prenas.
Johano reĝo serĉis trankviliĝon
En simileco de laboroj niaj;
Palac' kun ĉiuj ĝiaj fieruloj
Je monaĥejo tute similiĝis:
Servantoj en kapuĉoj, en harvestoj,
Novicoj fariĝadis kaj monaĥoj,
Kaj reĝo mem abato estis pia.
Vidadis mi en tiu sama ĉambro
(En ĝi Kirilo pia tiam vivis,
Verema viro; tiam mi jam ankaŭ
Eksciis dank' al Di' sensignifecon
De mondo), — tie ĉi mi vidis reĝon
De ekzekutoj kaj de pensoj lacan:
Enpensa, pia, li, Minaca, sidis;
Ni ĉiuj antaŭ li senmove staris,
Kaj li kun ni mallaŭte paroladis.
Li diris al abat' kaj al frataro:
„Ho, patroj miaj! venos iam tago —
Kaj tie ĉi pro savo mi jam estos;
Vi, Nikodim', Sergio kaj Kirilo,
Alprenu vi promeson mian sanktan:
Alvenos mi, krimulo malbenita,
Kaj al piedoj viaj, sankta patro,
Falinte, pia mi monaĥ' fariĝos."
Parolis, tiel plej potenca reĝo,
Kaj dolĉe fluis liaj bonaj vortoj,
Kaj ploris li. Kaj ni kun larmoj preĝis,
Ke Dio bona sendu amon, pacon
Al lia peka, malkvieta koro. —
Kaj filo lia Teodor'? Sur trono
Pensadis ĉiam li pri paca vivo

De Diservanto. Li palacon reĝan
Aliformigis en monaĥan ĉambron;
En tiu ĉambro ŝarĝaj reĝaj pensoj
Ne indignigis jam animon lian.
Ekamis Dio reĝan humilecon,
Kaj ja sub li Rusuj' en granda gloro
Konsolis sin, — kaj kiam li mortadis,
Nepriskribebla mirindaĵ' okazis:
Al lia lito venis viro luma,
Videbla sole nur al pia reĝo, —
Kaj Teodor' kun li interparolis
Kaj nomis lin plej granda patriarko . . . .
Kaj ĉiuj estis forte timigitaj,
Ĉielan tiun vidon kompreninte,
Ĉar antaŭ reĝo sankta patriarko
En ĉambro tiu tiam ne troviĝis.
Kaj kiam mortis li, palaco tuta
Pleniĝis tuj per sankta bonodoro,
Vizaĝ' do lia, kvazaŭ suno, brilis. —
Jam ne ekvidos ni tielan reĝon!
Ho, plej terura, granda malĝojego!
Ni kolerigis Dion, ni ekpekis:
Regnestron ni de reĝo mortiginton
Elektis!

Grigorio. Longe jam, ho sankta patro,
Demandi vin deziris mi pri morto
De juna Dimitrio; vi ja tiam,
Mi aŭdis, estis en Uglič'.

Pimeno. Memoras! . . .
Devigis Dio min malbonon vidi, —
Terura peko! Tiam mi Ugliĉon
Pro ia novicaĵ' sendita estis.
Mi venis nokte. Jen matene frue
Ekaŭdis mi tumultan sonorilon . . . .
Kriego, bruo . . . . Oni kuras korton
Reĝinan . . . ankaŭ mi, — kaj tie estas

Jam tuta urbo . . . Vidas mi reĝidon:
Jen mortigita li sur tero kuŝas.
Reĝin'-patrino apud li en sveno,
En malespero ploras nutristino, —
Kaj jam popol' furioziĝe trenas
Malpian perfidintan vartistinon. . . .
Subite jen kruela, tute pala
Aperas tie Judo — Bitjagovskij.
„Jen, jen krimulo!“ ĉiuj tuj ekkriis,
Kaj oni lin disŝiris. Poste multaj
Ekkuris post aliaj tri krimuloj;
Kaŝintajn sin krimulojn oni kaptis
Kaj alkondukis al infan' malviva:
Ho, mirindaĵo! — malvivul' ektremis!
„Ekpentu!“ al krimuloj oni kriis;
Kaj en teruro granda sub hakilo
Ekpentis ili — kaj Borison nomis.

Grigorio. De kia aĝ' reĝido tiam estis?

Pimeno. Sep-jara, ŝajne; nun li sekve estus —
(Dek jaroj pasis jam . . . Ne, ne, pli multe:
Dek du.) — li estus via samaĝulo
Kaj reĝus; Dio do alie volis.
Per tiu ĉi rakonto mi nun finos
Kronikon mian; jam de tiu tempo
Malmulte mi eniĝis mondon. Frato,
Ellernis vi legadon kaj skribadon,
Al vi transdonas mi laboron mian.
Libera kiam estos vi de preĝo,
Ne filozofiante nur, priskribu
Vi ĉion, kion vi en vivo vidos:
Militon, pacon, kaj regadon reĝan,
Kaj mirindaĵojn ĉiujn de sanktuloj,
Kaj profetaĵojn, kaj ĉielajn signojn, —
Al mi do tempo estas jam ripozi,
Estingi lampon. . . . Sed sonor' jam estas
Al sankta preĝ'. . . . Servantojn benu, Dio! . . .
Al mi bastonon donu, Grigorio. . . . (li foriras.)

Grigorio. Boriso! . . . Ĉio antaŭ vi tremadas!
Neniu memorigi vin kuraĝas
Pri sorto de infano malfeliĉa;
Kaj en malluma ĉambro jen ermito
Teruran tie ĉi raporton skribas. . . .
Kaj kiel de terura juĝo Dia,
Vi ankaŭ juĝon mondan ne evitos! . . .

Ĉambroj de patriarko.

Patriarko kaj **abato** de Ĉudova Monaĥejo.

Patriarko. Kaj li forkuris, patro abato?

Abato. Forkuris, sankta patro, — jen jam pasis tria tago.

Patriarko. Petolulo malbenita! El kia gento li devenas?

Abato. El gento de Otrepiev'oj, de nobelidoj; en frua juneco li fariĝis monaĥo, — oni ne scias kie, loĝis en Suzdal, en Jefima monaĥejo; de tie li foriris, estadis en diversaj monaĥejoj, — fine li venis al mia Ĉudova frataro; mi, vidante, ke li estas ankoraŭ juna kaj senprudenta, donis lin sub estradon de patro Pimeno, maljunulo kvieta kaj humila. Li estis scianta legi kaj skribi, li legadis niajn kronikojn, verkadis kanonojn por sanktuloj, — sed, videble, tiu ĉi sciado ne de Dio estis al li donita. . . .

Patriarko. Ho, tiuj ĉi sciuloj! Kian sensencaĵon li elpensis! „Mi estos reĝo en Moskvo!" Ho, vazo diabla! . . . Sed pri tio ĉi oni ne devas eĉ raporti al reĝo; pro kio tumulti patron-regnestron? Sufiĉe estos anonci pri lia forkuro al sekretario Smirnov, aŭ al Sekretario Jefimief. . . . Kia herezo! „Mi estos reĝo en Moskvo!" Oni devas kapti, kapti servanton diablan, kaj forsendi lin Solovkan monaĥejon por eterna pentado. — Tio ĉi ja herezo estas, patro abato?

Abato. Herezo, sankta patro, ĝusta herezo! . . .

Reĝa palaco.

Du korteguloj.

Unua. Regnestro kie?

Dua. En dormejo sia.
Kun ia li sorĉisto sin enŝlosis.
Unua. Jen kia estas lia okupado!
Sorĉistoj, magiistoj, sorĉistinoj!
Divenas ĉiam, kvazaŭ fianĉino.
Mi volus scii, kion li divenas?
Dua. Jen iras li. Ĉu volas vi demandi?
Unua. Malluma li. . . .
(ili foriras.)
Reĝo (eniras). Atingis mi potencon . . .
Jam sesan jaron reĝas mi trankvile,
Feliĉon do ne havas! . . . Ĉu ne tiel
Ni en juneco enamiĝas, volas
Plezurojn amajn, sed nur kvietigis
Malsaton koran ni per posedado, —
Malvarmiĝinte jam, ni turmentiĝas! . . .
Al mi sorĉistoj vane promesadas
Longegajn tagojn de potenc' trankvila, —
Nek vivo, nek potenco min gajigas:
Mi antaŭsentas tondron kaj malĝojon.
Feliĉ' forestas. Pensis mi popolon
En kontentec', en gloro kvietigi,
Kaj per boneco ĝian amon trovi, —
Sed vanan provon baldaŭ mi forlasis:
Potenco viva por popol' ne estas
Agrabla, — ĝi mortintojn sole amas. —
Malsaĝaj estas ni, se kri' popola,
Aŭ forta plor' tumultas nian koron. —
Malsaton sendis Di' sur nian teron;
Popolo en suferoj pereadis;
Por ili tuj malfermis mi grenejojn;
Mi oron ŝutis; mi laborojn trovis —
Kaj ili furioze min mallaŭdis!
Bruleg' iliajn domojn neniigis;
Por ili mi konstruis novajn domojn —
Kaj ili min riproĉis je brulego!
Jen estas juĝo, amo de popolo!

En familio serĉis mi konsolon,
Filinon mi ekvolis edzinigi;
Fianĉon morto, kvazaŭ vent', forportis —
Kaj jen subite ruza famo faras
Min kulpa je filina vidvineco,
Min mem, min mem, min, patron malfeliĉan! . . .
Se iu mortas, — mortigint' mi estas:
Mi rapidigis morton Teodoran,
Venenis ankaŭ mi fratin'-reĝinon,
Humilan monahinon . . . mi eterne!
Mi sentas: nin nenio iam povas
En mondaj malĝojegoj kvietigi;
Nenio. . . . Eble, sola konscienco, —
Jes, sola ĝi, sendube, ektriumfos
Je malboneco kaj je kalumnio;
Sed se en ĝi makulo kvankam unu,
Nur unu, eĉ okaze, ektroviĝis,
Mizero estas: kvazaŭ per ulcero
Anim' forbrulos, koro veneniĝos,
Riproĉo, kvazaŭ per martelo, frapas
En kap', kaj naŭzo ĉiam, kaj kapturno,
Kaj punktoj estas sangaj en okuloj . . .
Forkuri vi deziras, sed . . . Terure!
Terure! . . . Plej mizera estas tiu,
En kiu konscienc' ne pura estas! . . .

Drinkejo sur Litva limo.

Misailo kaj **Varlaamo**, vagistoj — kvazaŭ monaĥoj; **Grigorio Otrepiev** en ordinara vesto; **mastrino**.

Mastrino. Per kio do mi vin regalos, honoraj maljunuloj?

Varlaamo. Per tio, kion Dio donis, mastrineto. — Ĉu vi ne havas brandon?

Mastrino. Kial do ne, pastroj miaj! Mi tuj alportos.

(Ŝi eliras.)

Misailo. Pro kio do vi eksopiris, kolego? Jen estas limo Litva, kiun vi tiel volis atingi.

Grigorio. Ĝis mi estos en Litvo, ĝis tiu tempo mi ne povas estî trankvila.

Varlaamo. Kial vi tiel ekamis Litvon? Jen ni, patro Misailo kaj mi, peka, de tiu tempo kiel ni forkuris el monaĥejo, ni pri nenio eĉ pensas: ĉu Litvo, ĉu Rusujo, ĉu fajfilo, ĉu harpo, por ni estas tute egale, estu nur brando . . . kaj jen ankaŭ ĝi estas! . . .

Misailo. Bone dirite, patro Varlaamo.

Mastrino (eniras). Jen, vi havas, patroj miaj. Trinku por sano.

Misailo. Mi dankas, kara, Dio vin benu. (Ili trinkas. Varlaamo ekkantas.) Kial do vi ne kantas kaj ne trinkas?

Grigorio. Mi ne volas.

Misailo. Libero estas por liberulo. . . .

Varlaamo. Kaj paradizo — por malsobrulo, patro Misailo! Trinku do glaseton pro mastrineto . . . (li trinkas.) Tamen, patro Misailo, kiam mi drinkas, tiam mi ne amas sobrajn: alia afero estas drinkado, kaj alia — fierado; se vi volas vivi kiel ni, — ni petas, se ne — for! malaperu: arlekeno ne estas kolego por pastro.

Grigorio. Sidu ĉe brando kaj pensu pri grando, patro Varlaamo! . . . Ĉu vi vidas, mi ankaŭ iafoje scias bone diri.

Varlaamo. Pri kio do mi devas pensi?

Misailo. Forlasu lin, patro Varlaamo.

Varlaamo. Kial do li estas tia fastulo? Li mem al ni venis, kiel kolego, oni ne scias — kiu, ne scias — de kie, — sed li tiel fieras. (Li trinkas kaj kantas.)

Grigorio (al mastrino). Kien iras tiu ĉi vojo?

Mastrino. Litvon, mia kara, al Luevaj montoj.

Grigorio. Kaj ĉu malproksime estas Luevaj montoj?

Mastrino. Ne malproksime, ĝis vespero oni povus tien aliri, se ne estus baroj reĝaj kaj gardantaj observistoj.

Grigorio. Kiaj baroj? Kion tio ĉi signifas?

Mastrino. Iu forkuris el Moskvo, kaj estas ordonite ĉiujn kapti kaj pririgardi.

Grigorio (al si mem). Jen vi havas! . . . (Laŭte.) Kiun do oni bezonas? Kiu forkuris el Moskvo?

Mastrino. Dio lin konas, ĉu ŝtelisto, ĉu rabisto, — sed tie ĉi eĉ bonaj homoj nun ne povas trairi. Kaj kiaj rezultatoj el tio ĉi estos? Neniaj; oni eĉ laman diablon ne kaptos: kvazaŭ Litvon ne ekzistas alia vojo, krom vojo granda! Jen, ekzemple, de tie ĉi — sin turnu maldekstre, kaj per arbaro iru sur vojeto ĝis preĝejeto, kiu estas super Ĉekana rivereto, kaj poste rekte trans marĉon al Ĥlopino, de tie al Zaĥarievo, kaj tie jam ĉiu knabeto povas vin alkonduki al Luevaj montoj. Tiuj ĉi observistoj nur pasantojn premas, kaj nin, mizerulojn, ĉirkaŭŝiras. (Estas aŭdata bruo.) Kio tie ankoraŭ estas? Ha, jen estas ili, malbenitaj! ili patrolas.

Grigorio. Mastrino! ĉu vi ne havas en dometo ian alian angulon?

Mastrino. Ne, mia kara, — mi mem volus min kaŝi. Estas nur solaj vortoj, ke ili patrolas, — sed donu al ili brandon, panon kaj ĉion, — malviviĝu ili, malbenitaj! Ke ili. . . .

(Observistoj eniras.)

Observisto. Bonan tagon, mastrino!

Mastrino. Bone venu, karaj gastoj, mi petas!

Unua observisto (al dua). Ba! Tie ĉi oni drinkas; ni havos, kion manĝeti. (Al monaĥoj) Vi kiaj homoj estas?

Varlaamo. Ni estas Diaj maljunuloj, monaĥoj humilaj, ni iradas en vilaĝoj, kaj kolektas almozon kristanan por monaĥejo.

Observisto (al Grigorio). Kaj vi?

Misailo. Nia kolego. . . .

Grigorio. Mi estas burĝo el urbeto; mi akompanis maljunulojn ĝis limo; de tie ĉi mi iros hejmen.

Misailo. Ĉu vi jam ne volas. . . .

Grigorio (mallaŭte). Silentu.

Observisto. Mastrino, donu ankoraŭ brandon; ni do tie ĉi kun maljunuloj trinkos kaj interparolos.

Dua observisto (mallaŭte). Knabo, ŝajne, estas nuda, de li oni nenion povas preni; sed maljunuloj. . . .

Unua. Silentu, tuj ni ilin palpos. — Kio do, patroj miaj, ĉu bone iras viaj aferoj?

Varlaamo. Malbone, filo, malbone! Nun kristanoj fariĝis avaraj; ili monon amas, monon kaŝas. Malmulte ili donas al Dio. Venis peko granda sur popolojn terajn. Ĉiuj komencis komercadi, profitadi; pensas pri monda riĉeco, sed ne pri savo de animo. Ni iradas, iradas; petadas, petadas; iafoje en tri tagoj eĉ tri kvaronkopekojn ne povas elpeti. Tia estas peko! Forpasas semajno, dua, ni enrigardas monujon, kaj en ĝi estas tiel malmulte, ke eĉ honte estas monaĥejon iri; kion fari? de malĝojo ni eĉ restajon fordrinkas; mizero estas, kaj nenio plu. — Ho, malbone estas, videble, nia lasta tempo venis. . . .

Mastrino (ploras). Dio kompatu kaj savu!

(En daŭro de Varlaama parolo unua observisto signife rigardas Misailon.)

Unua observisto. Alekso! Ĉu vi havas reĝan ordonon?

Dua. Jes, mi havas.

Unua. Donu do ĝin al mi.

Misailo. Kial vi tiel atente min rigardas?

Unua observisto. Jen kial: el Moskvo forkuris iu malbona herezisto, Griŝko Otrepiev. Ĉu vi tion ĉi aŭdis?

Misailo. Mi ne aŭdis.

Observisto. Ne aŭdis? Bone. Kaj tiun forkurintan herezistON reĝo ordonis kapti kaj sufoki. — Ĉu vi tion ĉi scias?

Misailo. Ne, mi ne scias.

Observisto (al Varlaamo). Ĉu vi scias legi?

Varlaamo. En juneco mi sciis, sed forgesis.

Observisto (al Misailo.) Kaj vi?

Misailo. Min ne instruis Dio.

Observisto. Jen, vi havas reĝan ordonon.

Misailo. Por kio mi ĝin bezonas?

Observisto. Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi forkurinta herezisto, ŝtelisto kaj fripono — estas vi.

Misailo. Mi? Kompatu! kion vi diras!

Observisto. Haltu! Fermu pordon. Jen ni tuj ekscios.

Mastrino. Ha! malbenitaj turmentistoj! Ili eĉ maljunulon ne forlasas!

Observisto. Kiu tie ĉi scias legi?

Grigorio (eliras antaŭen). Mi scias!

Observisto. Jen, prenu. . . . Sed de kiu vi ellernis?

Grigorio. De nia sanktaĵisto.

Observisto (donas al li ordonon). Legu do laŭte.

Grigorio (legas). „El Ĉudova monaĥejo seninda monaĥo Grigorio, el gento de Otrepievoj, fariĝis herezisto kaj, instruita de diablo, kuraĝis eksciti sanktan frataron per diversaj tentaĵoj kaj malpiaĵoj. Kaj, laŭ informiĝoj, montriĝis, ke forkuris li, malbenita Griŝko, al limo Litva. . ."

Observisto (al Misailo). Kiel do ne vi?

Grigorio. „Kaj reĝo ordonis lin kapti. . . ."

Observisto. Kaj sufoki!

Grigorio. Tie ĉi ne estas dirite: „sufoki".

Observisto. Vi mensogas! ne ĉiun vorton oni skribas en linion. Legu: kapti kaj sufoki.

Grigorio. „Kaj sufoki. Aĝon havas ŝtelisto Griŝko. . . . (rigardante Varlaamon) pli ol kvindek jaroj, lia alteco estas meza, frunton li havas senharan, barbon grizan, ventron dikan."

(Ĉiuj rigardas Varlaamon.)

Unua observisto. Fratoj! Tie ĉi estas Griŝko! tenu, ligu lin! Mi eĉ ne pensis pri tio ĉi!

Varlaamo (depreninte paperon). For, petoluloj! Kia mi estas Griŝko? Kiel! kvindek jaroj, barbo griza, ventro dika! Ne, frato, vi ankoraŭ juna estas por fari ŝercojn kun mi. Mi jam longe ne legis kaj legas tute malbone, sed nun mi jam tralegos, se oni min volas sufoki. (Li legas silabe.) „Aĝon li havas de dudek jaroj." — Kio, frato, kie do estas kvindek? vidu — dudek?

Dua observisto. Jes, mi memoras, dudek; tiel same ankaŭ al ni estis dirite.

Unua observisto (al Grigorio). Vi, frato, videble, estas ŝerculo.

(En daŭro de legado, Grigorio staras, mallevinte kapon, havante manon en brusta poŝo.)

Varlaamo (daŭrigas). „Alteco lia estas malgranda, brusto larĝa, unu mano estas pli mallonga, ol alia, okuloj estas

bluaj, haroj — flavruĝaj, sur vango estas veruko, sur frunto — alia." Ĉu ne vi, amiko, tio ĉi estas?

(Grigorio subite elmetas ponardon; ĉiuj antaŭ li disiras; li rapide sin ĵetas fenestron.)

Observistoj. Tenu! Tenu! . . .

(Ĉiuj kuras en senordo.)

Moskvo. — Domo de Ŝujskij.

Ŝujskij, multego da gastoj; vespermanĝo.

Ŝujskij. Ankoraŭ vinon! (Li sin levas, ĉiuj ankaŭ.)
Karaj gastoj miaj,
Ĉerpilon lastan! Legu preĝon, knabo.

Knabo. Ĉiela reĝ', estanta ĉie, ĉiam!
Atentu preĝon vi de sklavoj viaj:
Unua preĝo pri regnestro nia,
De Dio elektita kaj plej pia,
Pri aŭtokrata reĝo de kristanoj.
En domo gardu lin, kaj en milito,
Sur vojoj, kaj sur lito de ripozo.
Al li de malamikoj venkon donu,
Kaj glora estu li de mar' ĝis maro.
En sano floru lia familio,
Kaj ĝiaj plej amindaj branĉoj ombru
Senfinan mondon; kaj al ni, al sklavoj,
Li estu, kiel ĉiam, bonfavora,
Afabla, bona, longepacienca;
Kaj fontoj de saĝec' lia senfina
Sur nin elfluu sufiĉege, gaje;
Kaj jen, ĉerpilon reĝan eklevinte,
Ni preĝas antaŭ Vi, Ĉiela Reĝo.

Ŝujskij (trinkas). Ho, estu ĉiam sana, granda reĝo!
Adiaŭ, gastoj miaj vi plej karaj;
Mi dankas, ke ne abomenis mian
Regalon vi. Adiaŭ, bonan nokton!

(Gastoj foriras, li akompanas ilin ĝis pordo.)

Puŝkin. Fine ili foriris; nu, princo Vasilij Ivanoviĉ, mi jam pensis, ke ni ne povos eĉ interparoladi.

Ŝujskij (al servantoj). Vi kial buŝon malfermis? Vi ĉiam nur sinjorojn viajn subaŭskultas. Forigu ĉion de tablo kaj iru for! — Kio okazis, Atanaso Miĥajloviĉ?

Puŝkin. Mirindaĵoj, kaj nenio plu!
Hodiaŭ mia nev', Gavrilo Puŝkin,
Al mi kurjeron sendis el Krakovo.

Ŝujskij. Nu?

Puŝkin. Strangan li al mi novaĵon skribas. . . .
Fil' de Johan' . . . Atendu. (aŭskultas ĉe pordo.)
Reĝa knabo,
Laŭ ordo de Boriso mortigita. . . .

Ŝujskij. Sed tio ĉi ne estas nov'.

Puŝkin. Atendu:
Dimitrij vivas.

Ŝujskij. Jen sciigo kia!
Reĝido vivas! Nu, mirinde estas!
Nur tio ĉi?

Puŝkin. Aŭskultu min ĝis fino:
Li estus kiu ajn, ĉu mem reĝido,
Ĉu ia eĉ spirit' en lia vido,
Aŭ tre kuraĝa uzurpul' — fripono, —
Sed tie nun Dimitrij ekaperis.

Ŝujskij. Ne povas esti.

Puŝkin. Lin mem Puŝkin vidis.
Unue kiam li palacon venis,
Tra vicoj da sinjoroj Litvaj rekte
Trairis li sekretan ĉambron reĝan.

Ŝujskij. Sed kiu li, de kie?

Puŝkin. Mi ne scias.
Nur oni scias, ke li longe servis
Ĉe Viŝneveckij; kaj ke kiam estis
Malsana li, li al konfesprenanto
Malkovris ian sekretaĵon gravan;
Kaj fierul', sekreton eksciinte,

Dorlotis lin, kaj levis lin de lito
Kaj lin al Sigizmund' forveturigis.
Ŝujskij. Vi ion aŭdis pri bravulo tiu?
Puŝkin. Mi aŭdis, ke li estas saĝa, lerta,
Al ĉiuj plaĉas. Forkurintojn Moskvajn
Li ravis tute. Litvaj pastroj estas
Kunuloj liaj. Reĝo lin dorlotas —
Kaj, oni diras, helpi lin promesis.
Ŝujskij. Nu, tio ĉi konfuzo tia estas,
Ke esti povas eĉ kapturno, frato.
Sendube, jes, li estas uzurpulo!
Konfesas mi, danĝero estas granda,
Sciigo grava estas! se atingos
Popolon ĝi, ventego estos forta.
Puŝkin. Ventego tia, ke malcerte reĝo
Konservos kronon sur saĝega kapo.
Kaj prave estos, ĉar li nin regadas
Simile je minaca reĝ' Johano.
Ĉu havas vi utilon, ke forestas
Por ĉiuj ni videblaj ekzekutoj,
Ke nun de sangigita plank' publike
Kanonojn ni ne kantas jam al Kristo,
Ke oni ne bruligas nin kaj reĝo
Per sia sceptro ne subŝovas karbojn?
Ĉu havas garantion ni en vivo!
Nin ĉiutage malfavor' atendas,
Malliberej', kapuĉo, aŭ katenoj,
Kaj ankaŭ eĉ malsata mort', aŭ maŝo.
Pli eminentaj niaj gentoj kie?
Kaj Ŝestunov, kaj Sickij-princoj kie?
Romanov, li, espero de patrujo?
Forturmentitaj estas en ekzilo. . . .
Tiela sama estos via sorto.
Eĉ hejme, kvazaŭ per Litvanoj, estas
Ni ĉirkaŭitaj per malfideluloj:
De ĉie — langoj, pretaj nin perfidi,

Ŝtelistoj, de estrar' subaĉetitaj.
Dependas ni de ĉia servutulo,
Se lin ni iafoje prave punis.
En propraj eĉ bienoj ni ne regas:
Maldiligentan sklavon ne forpelu!
Lin nutru! Laboriston eĉ ne provu
Forvoki de najbar'! alie — puno!
Ĉu iam aŭdis vi similan ion
Eĉ en reĝado de Minaca reĝo?
Ĉu vivas jam pli bone nun popolo?
Demandu ĝin. Jen, venos uzurpulo,
Al ĝi promesos li diversajn bonojn, —
Kaj estos jam amuz'.

Ŝujskij. Vi estas prava.
Sed ĉu vi scias? Pri sciigo tiu
Silentu ni ĝis tempo.

Puŝkin. Kompreneble,
Por si nur sciu. Estas vi prudenta;
Kun vi mi ĉiam amas paroladi,
Kaj se min io iam nur tumultas,
Mi tion jam de vi ne povas kaŝi;
Al tio mielvino kaj biero
Al mi malligis langon mian tiel . . .
Adiaŭ princ'!

Ŝujskij. Adiaŭ, ĝis sinvido.

(Akompanas lin.)

Reĝaj ĉambroj.

Reĝido desegnas geografian karton. **Reĝidino, nutristino** de reĝidino.

Ksenio (kisas portreton). Ho, mia kara fianĉo, mia plej bela reĝido, ne al mi vi apartenas, ne al via fianĉino, sed al malluma tombeto en fremda landeto: neniam mi min konsolos, eterne mi ploros.

Nutristino. Nu, reĝidino! Fraŭlino ploras, kvazaŭ roso falas: suno suriros, roson sekigos. Vi havos alian fianĉon

— kaj belegan kaj afablan. Vi lin ekamos, mia infano aminda, kaj vi forgesos Johanon-reĝidon.

Ksenio. Ne, nutristineto, al li, eĉ mortinta, mi estos fidela.

(Boriso eniras.)

Reĝo. Ksenio mia! ho, filino kara!
Ankoraŭ fianĉino — jam vidvino!
Vi ĉiam ploras pri fianĉo via?
Infano mia! sorto ne permesis
Al mi feliĉon vian eĉ vidadi.
Kredeble kolerigis mi ĉielon,
Feliĉon vian mi ne povis fari;
Sed vi, senkulpa! kial vi suferas?
Kaj vi, fileto mia, kion faras?

Teodoro. Mi? Teron Moskvan mi desegnas; vidu:
Jen estas tuta nia regn'; jen Moskvo,
Jen Novgorod, jen Astraĥan! Jen maro,
Plej densaj estas jen arbaroj Permaj,
Kaj jen Sibir'.

Reĝo. Kaj tio kio estas,
Jen, tie elkurbiĝas?

Teodoro. Volgo estas.

Reĝo. Tre bone! Dolĉaj fruktoj de scienco!
De nubo kvazaŭ, povas tuj ekvidi
Vi regnon tutan: urbojn kaj riverojn. . . .
Ho, lernu, fil', scienco mallongigas
Spertadojn de rapidfluanta vivo.
Jen iam, eĉ tre baldaŭ, eble, ĉiuj
Provincoj tiuj, kiujn vi hodiaŭ
Desegnis sur papero tiel bone,
Sub via glora potencado estos.
Ho, lernu, mia filo, pli facile
Laboron regnan tiam vi komprenos.

(Eniras Semiono Godunov.)

Jen iras kun raporto Semiono.
(Al Ksenio.) Animo mia, iru vian ĉambron;

Adiaŭ, kara; Dio vin konsolu.
(Ksenio kun nutristino foriras.)
Nu, kion diros Semion'?
Semiono Godunov. Hodiaŭ
Al mi de Puŝkin kaj de princ' Vasilij
Servantoj venis frue kun raporto.
Reĝo. Nu!
Semiono Godunov. Kaj servant' de Puŝkin alraportis,
Ke en maten' hieraŭ alveturis
Al ili el Krakov' kurjer', — kaj baldaŭ
Li sen letero resendita estis.
Reĝo. Tuj kaptu lin.
Sem. Godunov. Mi sendis persekuton.
Reĝo. Kaj Ŝujskij?
Sem. Godunov. Jen hieraŭ li regalis,
Amikojn siajn: fratoj Miloslavskij,
Buturlin estis, Saltikov Miĥajlo,
Kaj Puŝkin, kaj ankoraŭ kelkaj homoj;
Disiris ili tre malfrue. Puŝkin
Kun mastro mem nur en soleco restis,
Kaj longe ili interparoladis.
Reĝo. Alvoku tuje princon Ŝujskij.
Sem. Godunov. Reĝo!
Li estas tie ĉi.
Reĝo. Al mi lin voku!
(Godunov foriras.)
Reĝo. Kun Litvo interkomuniko! Kio?! . .
De Puŝkin gento estas abomena,
Al Ŝujskij ankaŭ mi ne tre konfidas:
Li ruza kaj kuraĝa, evitema. . . .
(Ŝujskij eniras.)
Bezonas mi kun vi interparoli.
Sed, ŝajne, vi mem venis pro afero,
Kaj tial mi aŭskultos vin unue.
Ŝujskij. Regnestro! devas mi al vi raporti
Sciigon gravan.

Reĝo. Mi jam vin aŭskultas.
Ŝujskij (mallaŭte montrante Teodoron).
Sed reĝo, jen. . . .
Reĝo. Reĝido povas scii
Pri tio, kion scias Ŝujskij. Diru.
Ŝujskij. El Litv' sciigo venis. . . .
Reĝo. Tiu, kiun
Kurjer' al Puŝkin mem alveturigis?
Ŝujskij. Li ĉion scias! . . . Pensis mi, regnestro,
Ke vi ne scias tiun ĉi sekreton.
Reĝo. Nenio, princo; volas mi kombini
Sciigojn, — ĉar alie ne ekscios
Ni veron.
Ŝujskij. Mi nur tion bone scias,
Ke en Krakov' aperis uzurpulo,
Kaj ke sinjoroj kaj mem reĝ' lin amas.
Reĝo. Sed kiu estas tiu uzurpulo?
Ŝujskij. Ne scias.
Reĝo. Sed. . . . per kio li danĝera?
Ŝujskij. Regnestro! forta estas via regno;
Per amo vi kaj per malavareco
Aldonitigis korojn de subuloj;
Sed mem vi scias, ke popolamaso
Perfida estas. forte ribelema,
Kaj ne espera, kaj superstiĉema, —
Obea estas al inspir' momenta,
Al vero — surda kaj indiferenta,
Ĝi nur al fabloj ĉiam konfidadas.
Kuraĝo senprudenta al ĝi plaĉas;
Kaj, se fripono tiu nesciata
Transiros iel nian limon Litvan,
Al li popolamason malsaĝegan
Altiros nom' reviva de Dimitrij.
Reĝo. Dimitrij! . . . Kiel? tiu ĉi infano?
Dimitrij! . . . Ha! . . . — Reĝido, vi foriru.
Ŝujskij (al si mem). Ruĝiĝis li: ventego estos! . . .

Teodoro. Reĝo,
Permesu, ke . . . .
Reĝo. Ne, mia filo, iru.
(Teodoro foriras.)
Dimitrij! . . .
Ŝujskij (al si mem). Li nenion tute sciis.
Reĝo. Aŭskultu, princo, ĉion tuj pretigu;
De Litv' Rusujo estu debarita
Per baroj; ke neniu kreitaĵo
Transiru nian limon; ke leporo
Eĉ ne alkuru el Poluj'; ke korvo
Ne flugu el Krakovo. Nu, rapidu!
Ŝujskij. Tuj.
Reĝo. Haltu. Ĉu ne vere, ke sciigo
Tre sprita estas? Ĉu vi iam konis
Mortintojn, el ĉerkujoj elirintajn,
Por demandadi reĝojn, leĝajn reĝojn,
Publike, unuvoĉe elektitajn,
De sankta patriarko mem kronitajn?
Ridinde? ha? Sed kial vi ne ridas?
Ŝujskij. Regnestro! . . .
Reĝo. Ne, aŭskultu, princ' Vasilij:
Eksciis kiam mi, ke tiun kna . . .
Ke tiu ĉi knabeto iel mortis,
Mi sendis vin por esplorado; nun do
Per kruco, kaj per Dio mi vin petas,
Laŭ konscienso, vi anoncu veron:
Ĉu vi ekkonis mortigitan knabon?
Kaj ĉu ne estis ŝanĝo? Nu, respondu.
Ŝujskij. Sed ĵuras mi . . . .
Reĝo. Ne, Ŝujskij, vi ne ĵuru, —
Respondu: ĉu reĝido estis?
Ŝujskij. Jes.
Reĝo. Pripensu, princ'. favoron mi promesas,
Mensogon jam pasintan mi ne punos
Per malfavoro. Sed se nun vi ankaŭ

Ruzas kun mi — je kap' de mia filo
Mi ĵuras vin kruele ekzekuti.
Mi tiel ekzekutos, ke Johano
Eĉ mem en ĉerko de terur' ektremos.
Ŝujskij. Ne puno, — malfavoro min timigas!
Ĉu mi kuraĝos antaŭ vi malici?
Kaj ĉu mi povis tiel ekerari,
Ke lin mi ne ekkonis? Mi tri fojojn
Vizitis en preĝejo malvivulon,
Portitan tien per Ugliĉo tuta.
Ĉirkaŭis lin ankoraŭ dek tri korpoj,
Per man' popola disŝiritaj, — ili
Jam rimarkeble tute forputradis,
Vizaĝo do reĝida estis klara,
Trankvila, freŝa, kvazaŭ li nur dormis;
Profunda vund' ankoraŭ ne krustiĝis,
Kaj trajtoj liaj tute ne ŝanĝiĝis. —
Ho ne, regnestro, tute mi ne dubas:
Dimitrij mortis.
Reĝo. Nu, sufiĉe, iru. (Ŝujskij foriras.)
Ha, ŝarĝe estas! . . . Pensojn mi kolektu! . . .
Mi tentis: sango tuta al vizaĝo
Sin ĵetis, poste reen ĝi defluis . . . .
Jen kial dek tri jarojn intersekve
Infanon mortigitan mi sonĝadis!
Jes, jes — jen kial! nun mi jam komprenas.
Sed kiu estas mia kontraŭulo?
Kaj kiu kontraŭ mi? Nur nomo, ombro, —
Ĉu povas ombr' de mi forŝiri kronon,
De idoj miaj heredaĵon preni?
Ho, malsaĝulo! kial mi ektimis?
Nur blovu vi fantomon — ĝi forflugos.
Jes, estas decidite: mi ne timos —
Malŝati tamen mi nenion devas . . . .
Tre peza vi, ho, ĉapo Monomaĥa!

Krakovo. Domo de Viŝneveckij.

Uzurpulo kaj **pastro Ĉernikova.**

Uzurpulo. Ne, mia patro, embaras' forestas.
Animon molan de popolo mia
Mi bone scias: ĉiam sankta estos
Por ĝi ekzemplo de regnestro ĝia.
Por religio — ĝi indiferenta.
Kaj baldaŭ — donas mi eĉ garantion —
Entute religio orienta
Ekamos forte Petran vikarion.

Patro. Vin bone gardu sankta Ignatio!
Alie jam komencos vi vivadi.
Sed nun, reĝido, devas vi ĝis tiam
Intencojn viajn en anim' kaŝadi;
Ŝajnigi sin kun plej malpia mondo
Al ni ordonas ofte sankta devo:
Aferojn viajn, vortojn — juĝas homoj,
Intencojn do nur sola Dio vidas.

Uzurpulo. Amen! Kiu ĉi?

(Eniras servanto.)

Diru: ni akceptas.

(Pordo malfermiĝas. Eniras amaso da **rusoj** kaj **poloj.**)

Kolegoj miaj! morgaŭ jam eliros
Ni el Krakovo. Mi deziras, Mniŝek,
Al vi Samboron pro tri tagoj veni.
Mi scias, ke kastel' gastama via
Briladas ĉiam per lukseco nobla
Kaj estas glora per mastrino juna.
Marinon plej belegan mi esperas
Ekvidi tie. Vi do, ho amikoj,
Rusujo, Litvo, kun kuraĝ' levintaj
Standardojn fratajn kontraŭ malamiko
Malica ĉiam, mia malbonulo, —
De Slavoj filoj, baldaŭ mi kondukos
Por batalado kolegarojn viajn!
Sed inter vi mi vidas novajn homojn?

Gavrilo Puŝkin. Alvenis ili al favoro via
Pro glavo kaj servado.
Uzurpulo. Mi tre ĝojas.
Alvenu. Kiu do, al mi vi diru,
Belulo tiu?
Puŝkin. Kurbskij.
Uzurpulo. Glora nomo!
Parenc' vi estas de hero' Kazana?
Kurbskij. Mi — filo lia.
Uzurpulo. Vivas li?
Kurbskij. Ne, mortis....
Uzurpulo. Grandega saĝo! Viro de batalo!...
De tiu tempo tamen, kiam estis
Li sub antikva Olga urb' kun Litvoj,
Por venĝi tie siajn ofendadojn, —
Pri li silentas famo.
Kurbskij. Mia patro
Pasigis reston de vivado sia
En de Batorij donacita tero.
En izoleco li trankvile vivis,
Serĉante en sciencoj nur konsolon;
Sed ne konsolis lin laboro paca:
Patrujon de juneco memorante,
Pri ĝi li ĉiam forte sopiradis.
Uzurpulo. Ho, estro, malfeliĉa! Kiel hele
Tre ĝojas mi, heroo mia nobla,
Ke lia ido kun patruj' paciĝas —
De patroj kulpojn mi ne rememoras;
Alproksimiĝu, Kurbskij... donu manon!
Tre strange! Fil' de Kurbskij mem kondukas
Sur tronon — kiun? filon de Johano!...
Min helpas ĉio: homoj kaj mem sorto!
Kaj vi?
Polo. Sobanskij mi, nobel' libera.
Uzurpulo. Mi vin salutas, id' de libereco!
Al li trionon de salajr' elpagu.

Sed tiuj ĉi? Sur ili mi ekkonas
Patrujan veston. Ili estas niaj.
Ĥruŝĉov (salutas). Jes, nia patro-reĝ'. Ni estas viaj
Fervoraj, elpelitaj servutuloj.
El Moskvo ni de malfavor' forkuris
Al vi, regnestr', — pro vi ni estas pretaj
Eĉ morti, — estu niaj malvivuloj
Por vi ŝtupar' al Moskva reĝa trono.
Uzurpulo. Kuraĝu vi, senkulpaj turmentitoj —
Permesu nur al mi atingi Moskvon,
Kaj tie jam Boris elpagos ĉion.
Vi kiu?
Karelo. Venis mi de Don' libera.
Al vi min sendis niaj kuraĝuloj,
Okulojn viajn klarajn reĝajn vidi,
Al vi proponi ĉiujn niajn kapojn.
Uzurpulo. Mi konas Donon: mi ne dubis vidi
Standardon Donan inter miaj vicoj.
Tre dankas ni militon nian Donan.
Ni scias, ke kozakoj nune estas
Maljuste alpremataj kaj pelataj;
Sed se nin Dio helpos ekposedi
De patroj tronon, tuj, laŭ antikveco,
Favoros ni fidelan nian Donon.
Poeto (alproksimiĝas, malalte salutante kaj kaptante baskon de Griŝko).
Plej granda princo kaj reĝid' plej klara!
Uzurpulo. Vi kion volas?
Poeto (donas al li paperon). Prenu kun favoro
Mizeran frukton de fervor-laboro.
Uzurpulo. Ho, kion vidas mi? Latinaj versoj!
Plej sankta estas lig' de glav' kun liro, —
Ĉar unu laŭr' amike ilin ligos.
Sub norda mi ĉielo eĉ naskiĝis,
Sed kun latina muzo konatiĝis,
Kaj florojn de Parnas' mi kore amas.
Mi kredas profetaĵojn de poetoj.
Ne vane en ilia flama brusto

Ekbolas ravo: faron, kiun gloris
Poetoj jam antaŭe, benu Dio!
Alvenu, kara. Pro memoro mia
Alprenu. (Donas al li ringon.)
Kiam jam kun mi fariĝos
Antaŭdifin' de sorto, kiam kronon
Prapatran mi surmetos, ree aŭdos
Mi voĉon vian kaj inspiran himnon:
„Musa gloriam coronat gloriaque musam."
Kaj nun, amikoj, ĝis sinvido morgaŭ!
Ĉiuj. Eliru! . . Vivu princ' Dimitrij, vivu!
Eterne vivu granda princo Moskva! . .

Kastelo de vojevodo Mniŝek en Samboro.

Tualetejo de Marino.

Marino, Ruzja (ornamas ŝin). **Servantinoj.**

Marino (antaŭ spegulo).
Ĉu baldaŭ? Vi ne povas rapidigi?
Ruzja. Permesu — estas jen malfacilaĵo, —
Per kio vi vin volas ornamigi,
Per belaj perloj, aŭ per smeraldaĵo?
Marino. Al mi vi donu kronon diamantan.
Ruzja. Bonege! Vi memoras? vi ĝin vestis
Ankoraŭ kiam balon plej brilantan
Kortegan vi veturis? Tie estis
Vi kvazaŭ suno, — ĉiuj viroj restis
De vi en rav', fraŭlinoj for rapidis . . . .
Ĥotkeviĉ juna tiam vin ekvidis
Kaj sin mortpafis. . . . Kiu proksimiĝas
Al vi nur, tiu tuj vin enamiĝas! . .
Marino. Ĉu baldaŭ?
Ruzja. Tuj, fraŭlino kara mia.
Je vi esperas forte patro via;
Ne vane vidis vin reĝido, eble;
Ne povis li eĉ kaŝi ravon sian;
Kaj tial povas vi jam koron lian

Facile venki nun kredeble.
Ĉe ni lin sole amo tenas!
Monaton tutan jam, veninte
Al ni, militon forgesinte
Kaj tronon Moskvan, li festenas
Kaj Rusojn, Litvojn kolerigas. . . .
Al tio kio lin devigas?
Esperas mi, ke, kiam vin, fraŭlino,
Dimitrij faros Moskvan jam reĝinon,
Vi ne forlasos vian servantinon?

Marino. Ĉu pensas vi, ke estos mi reĝino?

Ruzja. Sed kiu? La plej bela vi ja estas,
Je vi egalaj per belec' forestas!
De Mniŝek gento cedis al nenia;
Vi estas bela super laŭdo ĉia. . . .
Feliĉa estos tiu, kiun vi ekamos,
Al kiu via bona kor' per amo flamos —
Se eĉ li estus reĝo nia
Aŭ eĉ de francaj reĝoj ido. . . .
Ne sole tiu ĉi reĝido
Mizera, nesciata ia!

Marino. Reĝidon tuta mond' lin opinias.

Ruzja. Sed ja pasintan vintron li estadis
Ĉe Viŝneveckij, kaj al li servadis.

Marino. Li kaŝis sin.

Ruzja. Nu, tion ĉi mi scias.
Sed ĉu jam estas vi sciinta,
Pri li popolo kion diras?
Ke estas li el Moskvo forkurinta
Fripono, kiu nur pro krimo iras.

Marino. Ho, kia sensencaĵo!

Ruzja. Tute vere!
Je tio ĉi ne kredas mi, fraŭlino;
Sed danka devas esti li sen fino,
Ke lin el multaj amas vi sincere. . . .

Servantino (enkuras). Alvenis gastoj!

Marino. Kiel, kara mia,
Vi tiel babilema estas
Kaj kiel longe vi min vestas!
Ruzja. Tuj, tuj! . . . (servantinoj kuradas kaj rekuradas).
Marino (al si mem).
Ekscios mi pri sort' pasinta lia. . . .

Vico da lumigitaj ĉambroj. Muziko.
Viŝneveckij kaj **Mniŝek.**

Mniŝek. Kun mia nur Marino li parolas,
Pri unu nur Marino ankaŭ pensas . . .
Afero al edziĝo proksimiĝos;
Ĉu pensis vi — konfesu, Viŝneveckij,
Ke iam ŝi, Marin' — reĝino estos?
Viŝneveckij. Mirinde estas! . . . Sed ĉu pensis Mniŝek,
Servanto mia prenos tronon Moskvan?
Mniŝek. Sed kia ja Marino mia estas?
Al ŝi mi sole diris: nu, rigardu!
Reĝidon ne forlasu! . . kaj subite
Finiĝis ĉio, li — en ŝiaj retoj!
(Muziko ludas polkon, Uzurpulo kun Marino iras en unua paro.)
Marino (al Uzurpulo). Jes, morgaŭ, jes en dekunua horo,
Aleo de tilioj, ĉe fontano. . . .
(Ili foriras. Dua paro.)
Sinjoro. Sed kion trovis en Marin' Dimitrij?
Sinjorino. Ŝi estas belulino.
Sinjoro. Ŝtona nimfo:
Okuloj, buŝo — sen ridet', sen vivo. . . .
(Nova paro.)
Sinjorino. Ne bela estas li, sed tre agrabla;
En li vidata estas reĝa sango.
(Nova paro.)
Sinjorino. Eliro kiam?
Sinjoro. Kiam li ordonos.
Ni pretaj estas; sed Marin' kun li
Videble, longe nin en kapto tenos.

Sinjorino. Agrabla estas kapto.
Sinjoro. Jes, se ankaŭ. . . . (Ili foriras; ĉambroj fariĝas malplenaj.)
Mniŝek. Ni, maljunuloj, nune jam ne dancas,
Muziko nin jam tute ne alvokas,
Manetojn ni ne premas kaj ne kisas . . . . .
Mi tamen ne forgesis petolaĵojn! . . .
Nun jam ne tio, kio estis iam!
Junar' ne tiel estas jam kuraĝa,
Beleco ankaŭ jam ne tiel ĝoja;
Konfesu: ĉio jam malgaja estas.
Forlasu ilin; iru ni, kolego,
Ordonu ni malŝtopi boteleton
Da vin' hungara ĉirkaŭherbigitan,
En anguleto ni duope trinku
Plej densan bonodoran fluidaĵon,
Kaj poste paroladu ni pri io.
Nu, iru, frato.
Viŝneveckij. Kaj afero iros.

Nokto. Gardeno. Fontano.

Uzurpulo (eniras). Kaj jen fontan'; ŝi tien ĉi alvenos.
Naskiĝis, ŝajne, mi ne tre timema,
Mi antaŭ mi proksime vidis morton:
Animo antaŭ morto ne tremadis.
Al mi minacis eĉ mallibereco,
Min oni persekutis — mi ne timis
Kaj per arogantec' libera restis.
Sed kio nun animon mian premas?
Pro kio nun mi tiel forte tremas?
Ĉu estas tio ĉi pasia tremo?
Ne, tio estas timo. Tutan tagon
Atendis mi sinvidon kun Marino,
Pripensis tion, kion mi eldiros,
Ensorĉos kiel mi fieran saĝon,
Kaj kiel nomos ŝin reĝinon Moskvan;

Sed venis hor', — nenion mi memoras,
Ne trovas mi parolojn ellernitajn;
Imagon mian tute am' konfuzas . . .
Sed io jen ekbrilis . . . jen brueto . . .
Ne, tio — lumo de malica luno,
Ventet' ekbruis tie ĉi. . . .

Marino (eniras). Reĝido!

Uzurpulo. Ŝi! . . Tuta sang' en vejnoj malvarmiĝis.

Marino. Dimitrij! vi?

Uzurpulo. Ho, sorĉa, dolĉa voĉo!
(Iras al ŝi.) Ĉu estas vi? Ĉu vin mi, fine, vidas
Kun mi sub nokta ombro en soleco?
Ho, kiel malrapide iris tago
Kaj malrapide suno estingiĝis!
Kaj kiel longe vin mi atendadis!

Marino. Forkuras horoj, mi ne havas tempon —
Mi tie ĉi kun vi kunveni volis
Ne por aŭskulti delikatajn vortojn
De amo. Vortoj estas malnecesaj.
Mi kredas, ke vi amas; sed aŭskultu:
Decidis mi kun via sorto brua
Kunigi mian sorton; sekve povas
De vi, Dimitrij, mi postuli solan:
Postulas mi, ke vi al mi malkovru
Esperojn ĉiujn de animo via
Intencojn ĉiujn kaj eĉ ĉiujn timojn;
Ke mi kun vi kuraĝe povu kune
Eniri vivon — kaj ne kiel blinda
Sklavino de deziroj ĉiuj edzaj,
Silenta kromvirino sole via,
Sed kiel via inda leĝ-edzino
Kaj helpantino de regnestro Moskva.

Uzurpulo. Almenaŭ nun permesu, ke forgesu
Mi tute zorgojn kaj tumultojn miajn!
Forgesu mem, ke antaŭ vi vi vidas
Reĝidon. Ho, Marino, nun vi vidu
En mi de vi amanton elektitan,

Feliĉan eĉ de sola vido via.
Aŭskultu kore vi petegojn amajn!
Permesu koron vi plifaciligi!

Marino. Ne estas tempo, princ'; vi malrapidas,
Kaj amo de kolegoj viaj ĉiuj
Jam malvarmiĝas; kaj nun, jam danĝeroj,
Laboroj viaj multe pligrandiĝas;
Jam min atingis malagrabla famo,
Kaj nova jam novaĵ' novaĵon ŝanĝas;
Kaj Godunov rapide pretiĝadas. . . .

Uzurpulo. Ĉu estas en potenco Godunova
Feliĉo sola mia, via amo?
Ne, ne! Rigardas nun indeferente
Mi tronon lian kaj potencon reĝan.
Sed via am' . . . sen ĝi por kio estas
Kaj mia viv', kaj gloro, kaj potenco?
Vi en dezerto eĉ, en terdometo
Por mi anstataŭigos reĝan kronon.
Jes, amo via. . . .

Marino. Hontu! Ne forgesu
Plej altan kaj plej sanktan vi difinon:
Ja via rang' pli kara devas esti
Por vi, ol ĉiuj ĝojoj, ravoj vivaj, —
Ĉar kun nenio povas ĝi egali.
Vi devas scii, ke ne al junulo,
Ravita tute per beleco mia
Mi kun soleno donas manon mian,
Sed nur al heredist' de Moskva trono,
Nur al reĝido, kiun sorto savis.

Uzurpulo. Marino bela, vi min ne turmentu,
Ne diru, ke ne min, sed mian rangon
Elektis vi. Marino, vi ne scias,
Ke vi al mi per tio koron pikas.
Ĉu vere, se . . . ho, dubo plej terura!
Eldiru: se al mi ne reĝan naskon
Antaŭdifinus mia blinda sorto,
Se mi ne estus filo de Johano,

Ne tiu ĉi infano forgesita, —
Ĉu tiam . . . tiam vi min ankaŭ amus?
Marino. Dimitrij, vi ali' ne povas esti;
Alian mi ne amus.
Uzurpulo. Ne! sufiĉe —
Ne volas mi dividi kun mortinto
Al li apartenantan amantinon;
Sufiĉe sin ŝajnigi! mi eldiros
Jam tutan veron; sciu, ke Dimitrij
Pereis, mortis — kaj ne reviviĝos;
Ĉu volas scii vi, mi kiu estas?
Al vi mi diros: estas mi monaĥo;
Ekenuinte de malliberecо,
Mi sub kapuĉo mia grandan planon
Pripensis; mi al mondo mirindaĵon
Preparis, kaj el monaĥej' forkuris
Mi al kozakoj bruaj kaj kuraĝaj;
Ellernis rajdi mi kaj glavon uzi,
Al vi mi venis, nomis min „Dimitrij"
Kaj polojn mi sencerbajn tute trompis.
Nu, kion diros, vi, Marin' fiera?
Ĉu vi kontentas per konfeso mia?
Silentas vi?
Marino. Ho, honto, ho, malĝojo! (Silento.)
Uzurpulo (mallaŭte). Ho, kien do entiris min ĉagreno!
Feliĉon, malfacile konstruitan,
Mi por eterne, eble, pereigis.
Mi estas malsaĝul'! (Laŭte) Mi vidas, vidas;
Vi forte hontas je ne princa amo;
Eldiru do al mi fatalan vorton,
En via man' vi havas mian sorton;
Atendas mi. (Stariĝas sur genuojn.)
Marino. Vin levu, uzurpulo!
Ĉu pensas vi en mi, per genuflekso,
En konfidema kvazaŭ knabineto,
Vantegan mian koron favorigi?
Eraris vi: mi ĉe piedoj miaj

Eĉ grafojn noblajn, kavalirojn vidis;
Sed ilin malvarmege mi forĵetis, —
Kaj ne por vi, monaĥo forkurinta. . . .

Uzurpulo (sin levas). Ne malestimu junan uzurpulon;
En li sin kaŝas, eble, grandaj ecoj,
Je Moskva reĝa trono tute indaj
Kaj indaj je plej kara mano via. . . .

Marino. Je maŝo indaj, ho arogantulo!

Uzurpulo. Mi estas kulpa; dank' al fiereco
Mi Dion trompis, trompis ankaŭ reĝojn, —
Mensogis mi; sed vi min ekzekuti
Ne povas; antaŭ vi mi estas prava.
Ne, mi ne povis trompi vin, Marino.
Por mi vi estis sola nur sanktaĵo,
Kun ĝi ŝajnigi min mi ne kuraĝis:
Nur amo, amo nur ĵaluza, blinda,
Nur sola amo mia min devigis
Eldiri. . . .

Marino. Ho, per kio vi vin laŭdas!
Konfeson vian ĉu postulis iu?
Se vi, vagist' sennoma, nesciata,
Mirinde du popolojn jam blindigis, —
Almenaŭ nun vi nepre devas esti
Je via sukcesego tute inda
Kaj kuraĝegan trompon garantii
Nun per sekret' profunda kaj eterna.
Nu, diru, ĉu mi povas min aldoni
Al vi kaj, forgesinte mian genton
Kaj honton virgan, mian bonan sorton
Kunigi kun mizera via sorto,
Se mem vi ĉiam tiel flirtanime
Kaj simple malhonoron vian montras?
Vi nur pro amo ĉion elbabilis!
Mi miras, kial antaŭ mia patro
Vi ne malkovris sin pro amikeco,
Aŭ ankaŭ antaŭ nia reĝ' pro ĝojo,

Aŭ antaŭ eĉ sinjoro Viŝneveckij
Pro fervorego de fidela sklavo.
Uzurpulo. Al vi mi ĵuras, ke el koro mia
Nur vi konfeson povis elturmenti;
Mi ĵuras, ke neniam kaj nenie,
Nek en festeno ĉe pokal' da vino,
Nek en amika kora parolado,
Nek sub tranĉilo, nek en turmentado —
Sekreton tiun ĉi mi elbabilos.
Marino. Al mi vi ĵuras, kaj mi devas kredi.
Mi kredas! Sed, ĉu povas mi ekscii,
Per kio ĵuras vi? Per nom' de Dio,
Vi, pia kvazaŭfil' de jezuitoj?
Aŭ per honor', kiel heroo nobla?
Aŭ, eble, kiel vera reĝa filo,
Per sola reĝa vort'? Ĉu tiel? Diru.
Uzurpulo (fiere). Min ombro de Minaca reĝ' filigis,
„Dimitrij" min el ĉerk' malluma nomis,
Kaj ĉirkaŭ mi popolojn ekondigis, —
Kaj por ofer' al mi Borison donis.
Reĝido — mi. Sufiĉe! Mi nun hontas,
Ke antaŭ vi, fierulino pola,
Mi malaltiĝis. Fino! Nun adiaŭ!
Milita ludo, miaj grandaj zorgoj
Sopiron aman, eble, silentigos.
Ho, kiel vin komencos mi malami,
Forpasos kiam malhonora amo!
Mi iros nun, — aŭ krono, aŭ pereo
Atendas en Rusujo mian kapon;
Ĉu en batalo mi honore mortos,
Aŭ kiel eĉ krimul' sur ŝtipo placa, —
Ne estos vi jam mia amikino;
Kun mi vi mian sorton ne dividos;
Sed iam, eble, forte vi bedaŭros
Pri tiu sorto, kiun vi forĵetis.
Marino. Sed se mi ĝustatempe vian trompon
Elmontros klare antaŭ ĉiuj homoj?

Uzurpulo. Vi, eble, pensas, ke mi vin timegas?
Ke oni kredos al knabino pola
Pli multe, ol al mi, reĝido rusa?
Sed sciu: reĝo, papo kaj sinjoroj
Ne pensas eĉ pri ver' de vortoj miaj.
Dimitrij mi, aŭ ne — egale estas,
Mi estas nur preteksto de milito.
Nur tion ĉi bezonas ili; vin do,
Ribelistin', silenti ili igos.
Adiaŭ.
Marino. Ho, reĝido, haltu. Fine
Mi aŭdas jam parolon de grandaĝo.
Kun vi ĝi, princo, tute min pacigas.
Atencon senprudentan mi forgesas,
Reĝidon ree vidas. Sed aŭskultu:
Jam tempo, tempo estas! Ne prokrastu,
Konduku regimentojn vi al Moskvo;
Posedu Kremlon, ankaŭ tronon Moskvan —
Kaj poste jam al mi svatiston sendu;
Sed, aŭdas Dio, dum piedo via
Ankoraŭ ne ekpaŝos tronajn ŝtupojn,
Dum ne deĵetos vi de tron' Borison,
Pri via am' mi tute ne aŭskultos. (Foriras.)
Uzurpulo. Plivolas mi kun Godunov batali,
Aŭ ruzi kun kortega jezuito,
Ol kun virin'. Diablo ilin prenu!
Konfuzas, elkurbiĝas ŝi, kaj rampas,
El manoj lerte glitas, muĝas, pikas. . . .
Serpento estas! . . . Mi ne vane tremis.
Si nun apenaŭ min ne pereigis.
Sed mi decidis: morgaŭ ni eliros.

Limo Litva (16 Oktobro 1604).

Princo **Kurbskij** kaj **uzurpulo,** ambaŭ estas rajde. Regimentoj proksimiĝas al limo.

Kurbskij. (Alveturinte unue.)
Jen estas ĝi, jen estas rusa limo!
Rusujo sankta! mi jam estas via!

Kun malestim' mi polvon alilandan
Forskuas; kun avid' aeron novan
Enspiras mi: por mi ĝi estas hejma;
Ho, patro mia! nun animo via
Konsolis tute sin, kaj jam en ĉerko
Ekĝojos viaj malfeliĉaj ostoj!
Hered' ekbrilis ree nia grava,
Plej glora glav' — de Moskvaj reĝoj servo!
Nun en festeno brua ekdiboĉos
Ĝi pro espero-reĝo, patro nia! . . .

Uzurpulo. (Li veturas malrapide kun mallevita kapo.)
Feliĉa estas li! animo pura
En li de ĝojo, gloro ekpetolis!
Heroo mia, ho mi vin envias!
Heroo, en ekzilo edukita,
Ofendojn patrajn tute forgesinte,
Liberiginte lian kulpon tutan,
Vi prepariĝas pro Johana filo
Nun verŝi vian sangon, — leĝan reĝon
Redoni al patrujo . . . Estas vero,
En vi anim' de ĝojo devas flami.

Kurbskij. Ĉu vi ne ĝojas en animo via?
Rusujo estas via jam, reĝido.
En ĝi jam vin atendas ĉiuj koroj,
Kaj via Moskvo, via Kreml' kaj regno.

Uzurpulo. Ho, Kurbskij! Rusa sango elverŝiĝos!
Batalas vi pro reĝ', vi estas puraj.
Sed mi kondukas kontraŭ fratoj; Litvon
Mi sur Rusujon vokis; mi en Moskvon
Al malamikoj bonan vojon montras!
Sed ne sur min ekfalu mia peko,
Sed nur sur vin, Boris — reĝmortiginto!
Antaŭen! . . .

Kurbskij. Jes antaŭen! kaj pereo
Al Godunov, al mortigint' de reĝo!

(Ili rapide veturas. Regimentoj transiras limon.)

Reĝa magistrato.

Reĝo, patriarko kaj bojaroj.

Reĝo. Ĉu ebla ĝi? Monaĥo forkurinta
Al ni kondukas krimajn kolegarojn,
Al ni kuraĝas eĉ minaci! Tempo
Jam estas humiligi malsaĝulon!
Veturu vi, Trubeckij kaj Basmanov;
Bezonas helpon niaj vojevodoj.
De ribelisto ĉirkaŭita estas
Ĉernigov. Savu urbon.

Basmanov. Mia reĝo!
De nun apenaŭ pasos tri monatoj —
Kaj eksilentos fam' pri uzurpulo;
Ni Moskvon baldaŭ lin alveturigos
En fera kaĝo, kvazaŭ beston. Ĵuras
Per Dio mi. (Li kun Trubeckij foriras.)

Reĝo. Al mi regnestro Sveda
Per senditaro ligon proponadis;
Sed ne bezonas ni malpropran helpon —
Sufiĉe ni da propraj homoj havas,
Por forrebati perfidistojn litvajn.
Rifuzis mi.
Ŝĉelkalov! tuj dissendu
Ordonojn vi al ĉiuj vojevodoj,
Ke ili tuj sidiĝu sur ĉevalojn
Kaj ke por servo siajn homojn sendu;
En monaĥejoj ankaŭ vi elektu
Servantojn kelkajn. En pasintaj jaroj,
Mizero kiam al patruj' minacis,
Monaĥoj mem por batalado iris;
Sed nun tumulti ilin ni ne volas —
Por ni preĝadu ili: tia estas
Ordono kaj aljuĝo de bojaroj.
Kaj nun dissolvu ni demandon gravan:
Vi scias, ke malbona uzurpulo
Dismetis ĉie plej malican famon;
De li leteroj ĉie dissenditaj

Produktis dubon kaj tumulton grandan:
Sur placoj vagas murmuret' ribela,
Kaj saĝoj bolas . . . oni devas ilin
Malmulte malvarmigi; mi tre volus
Al ekzekutoj multaj antaŭveni, —
Sed kiel kaj per kio? nun decidu.
Vi, sankta patro, vian penson diru.

Patriarko. Benita estu Dio, inspirinta
Favoron kaj kvietan paciencon
Al via koro, ho, regnestro granda;
Ne volas vi pereon de pekanto,
Sed vi atendas, ke erar' forpasu:
Forpasos ĝi, sun' de eterna vero
Lumigos ĉiujn. —

Mi, preĝanto via,
En faroj mondaj ne tre kompetenta,
Kuraĝas nun al vi eldiri jenon:
Diabla fil', fripono malbenita,
Nomadas sin „Dimitrij" en popolo;
Per nomo de reĝid', kvazaŭ per vesto
Malpropra, li sin tute, ŝajne, kaŝis;
Sed nur disŝiru ĝin — kaj li subite
Malhonoriĝos per nudeco propra.
Jen Dio mem al ni rimedon sendas:
Regnestro, sciu: antaŭ ses jam jaroj,
En tiu sama jaro, kiam Dio
Vin por regado en favoro benis —
Al mi en hor' vespera iam venis
Paŝtisto simpla, maljunul' grandaĝa;
Mirindan diris li al mi sekreton:
„Mi en juneco, diris li, blindiĝis,
Kaj sciis mi nek nokton kaj nek tagon
Ĝis maljuneco. Vane min kuracis
Per herboj mi kaj per almurmurado;
Kaj vane mi iradis por saluto
En monaĥejoj al mirindfaristoj;
Kaj vane ŝprucis mi el sanktaj putoj

Okulojn blindajn per saniga akvo —
Al mi ne sendis Dio resaniĝon.
Jen, fine, mi esperon tute perdis,
Alkutimiĝis, kaj eĉ miaj sonĝoj
Al mi neniajn jam alprezantadis
Objektojn ekzistantajn en naturo,
Nur sonojn sonĝis mi.
Jen unu fojon
En sonĝo aŭdas mi, ke voĉ' infana
Al mi ekdiris: iru, maljunulo,
Ugliĉon, de Aliformiĝ' preĝejon;
Sur mia tombo tie vi ekpreĝu,
Favora Dio, eble, vin pardonos.
Sed kiu vi? demandis mi infanon.
Dimitrij mi, reĝido. Reĝ' ĉiela
Akceptis min en rondon de anĝeloj
Kaj nun mi granda mirindaĵfaristo.
Ekiru, maljunulo. Mi vekiĝis
Kaj pensis: eble, efektive, Dio
Al mi donacas sanktan resaniĝon.
Kaj mi ekiris malproksiman vojon.
Ugliĉon mi atingis; jen mi venas
Preĝejon sanktan kaj aŭskultas preĝon,
Kaj en fervoro mi anima ploras,
Sed tiel dolĉe, kvazaŭ jam blindeco
Per larmoj el okuloj miaj fluis.
Popolo jam eliris, — kaj mi diris
Al nepo: min konduku vi al ĉerko
De sankt-reĝido. Kaj knabeto mia
Kondukis min, — kaj nur mi antaŭ ĉerko
Mallaŭtan preĝon pie elparolis,
Okuloj sin malfermis: kaj ekvidis
Mi lumon Dian, nepon kaj tombeton."
Jen, reĝo, kion maljunul' rakontis.

(Komuna konfuzo. En daŭro de tiu ĉi rakonto Boris kelkajn fojon elviŝas per tuketo vizaĝon.)

Ugliĉon tiam mi intence sendis

Servanton, kaj eksciis li, ke multaj
Ricevis resaniĝon antaŭ ĉerka
Tabulo de reĝido mortigita.
Konsilas mi: restaĵojn sanktajn Kremlon
Transporti kaj starigi en preĝejo
De Ĉefanĝeloj: kaj popolo klare
Ekvidos tiam trompon de krimulo,
Kaj fort' diabla tute malaperos.

(Silento.)

Princo Ŝujskij. Ho, sankta patr', intencojn de Plejsupra
Ĉu scias iu? Mi lin ne kritikos.
Neputran morton, forton mirindfaran
Li povas doni al infanaj ostoj;
Sed oni devas famon de popolo
Esplori tre atente, senpartie;
Kaj ĉu ni povas nun, en brua tempo,
Eĉ pensi pri afero tiel grava?
Parolos oni, ke sanktaĵon uzas
Ni, kiel ilo, en aferoj mondaj.
Popolo jam sen tio ŝanceliĝas,
Kaj multe da paroloj bruaj estas:
Ne estas temp' ondigi saĝojn homajn
Per tiel grava nova enkonduko.
Mi vidas, ke forigi oni devas
De uzurpulo dismetitan famon;
Sed estas ja rimed' alia ankaŭ.
Regnestro, se vi nur al mi permesos,
Mi mem aperos tuj sur plac' popola,
Admonos mi, riproĉos malsaĝulojn
Kaj trompon de fripono mi elmontros.

Reĝo. Nu, estu tiel! Sankta patriarko,
Mi petas vin palacon nian veni:
Bezonas mi kun vi interparoli.

(Li foriras; post li ankaŭ bojaroj.)

Unu bojaro (mallaŭte al alia).
Ĉu vi rimarkis, kiel reĝ' paliĝis,
Kaj ŝvito de vizaĝo lia gutis?

Dua. Mi ne kuraĝis eĉ okulojn levi,
Mi ne kuraĝis spiri kaj min movi.
Unua. Kaj liberigis Ŝujskij'-princ'. Bravulo!

Placo antaŭ katedra preĝejo en Moskvo.

Popolo.

Unua. Ĉu baldaŭ jam reĝo eliros el preĝejo?
Dua. Meso finiĝis; nun fariĝas preĝo.
Unua. Kio do? oni jam malbenis lin?
Dua. Mi staris en vestiblo kaj aŭdis, ke diakono anoncis: Griŝko Otrepiev estu malbenita!
Unua. Malbenu, malbenu; reĝidon ne interesas Griŝko.
Dua. Kaj al reĝo nun oni kantas eternan memoron.
Unua. Eternan memoron al viva! Ho, kiaj ili estas malpiuloj!
Tria. Jen bruo! Ĉu ne reĝo?
Kvara. Ne, tio ĉi estas frenezulo.

(Eniras **frenezulo** en fera ĉapo, pripendigita per ĉenoj kaj ĉirkaŭita per **knabetoj.**)

Knabetoj. Fera ĉapeto! Fera ĉapeto! . .
Maljunulino. Forlasu lin, diabletoj. Preĝu, feliĉulo, por mi peka.
Frenezulo. Donu, donu, donu kopekon!
Maljunulino. Jen vi havas kopekon; preĝu do por mi.
Frenezulo (Sidiĝas sur teron kaj kantas):

Luno veturas,
Kateto ploras,
Frenezulo, vin levu,
Dion preĝu!

(**Knabetoj** ree lin ĉirkaŭas.)

Unu el ili. Bona tagon, frenezulo, kial do vi ĉapon ne deprenas? (frapas lian feran ĉapon.) Jen, kiel ĝi sonas!
Frenezulo. Jen, mi kopekon havas.
Knabeto. Ne estas vero! nu, montru.

(Deprenas kopekon kaj forkuras).

Frenezulo (ploras). Oni prenis mian kopekon, oni ofendis frenezulon.

Popolo. Reĝo, reĝo iras!

(**Reĝo** eliras el preĝejo; **bojaro** antaŭe disdonas al malriĉeguloj almozon. **Bojaroj.**)

Frenezulo. Boris, Boris! Knabetoj ofendas frenezulon.

Reĝo. Donu al li almozon! Pri kio li ploras?

Frenezulo. Knabetoj min ofendas .... Ordonu ilin forbuĉi, kiel vi forbuĉis malgrandan reĝidon.

Bojaroj. Iru for, malsaĝulo! Kaptu malsaĝulon!

Reĝo. Forlasu lin. Preĝu por mi, frenezulo. (Foriras.)

Frenezulo (tuj poste al li). Ne, ne! Oni ne povas preĝi por reĝo-Irodo: Dipatrino ne permesas.

Sjevsko.

Uzurpulo, ĉirkaŭita per siaj homoj.

Uzurpulo. Kaptito kie?

Polo. Tie ĉi.

Uzurpulo. Alvoku!

(Eniras **rusa kaptito.**)

Vi kiu?

Kaptito. Mi — Roĵnov, nobelo Moskva.

Uzurpulo. Ĉu longe servas vi?

Kaptito. Monato pasis.

Uzurpulo. Ĉu vi ne hontas, ke vi levis glavon
Sur min, Roĵnov?

Kaptito. Ne mia estas volo.

Uzurpulo. Ĉu vi batalis sub Sjeverskij?

Kaptito. Venis
Mi post batalo jam, post du semajnoj.

Uzurpulo. Boriso kio?

Kaptito. Forte timigita
Per perdo de batalo kaj per vundo
De princ' Mstislavskij, — kaj li princon Ŝujskij
Alsendis al militistaro.

Uzurpulo. Kial
Devokis li en Moskvon Basmanov'on?

Kaptito. Meritojn liajn rekompencis reĝo

Per oro kaj honor'. En magistrato
Li estas.
Uzurpulo. Ĉi li estis pli necesa.
Nu, kio do en Moskvo?
Kaptito. Tre kviete.
Uzurpulo. Ĉu oni min atendas?
Kaptito. Dio scias;
Pri vi paroli oni ne kuraĝas.
Al unu langon, al alia kapon
Fortranĉas oni. Tia estas tempo,
Ke ĉiutage oni ekzekutas;
Malliberejoj tute jam pleniĝis;
Sur placo, kie nur tri homoj estas —
Spion' jam tie ankaŭ ĉirkaŭsaltas,
Kaj mem regnestro en libera tempo
Sekretajn raportistojn demandadas.
Pli bone, sekve, tute jam silenti.
Uzurpulo. Ne enviinde vivas homoj moskvaj!
Nu, kaj militistaro kio?
Kaptito. Kio?
Vestita estas ĝi kaj ankaŭ sata,
Kontenta estas.
Uzurpulo. Ĉu ĝi estas granda?
Kaptito. Nur Dio scias.
Uzurpulo. Tridek miloj estas?
Kaptito. Eĉ povas vi kalkuli kvindek miloj!
(Uzurpulo enpensiĝas; ĉiuj rigardas unu alian.)
Uzurpulo. Nu! kaj pri mi parolas oni kion?
Kaptito. Pri via princa moŝto oni diras,
Ke, se eĉ estus vi fripono, tamen
Bravulo.
Uzurpulo (ridante). Tion ĉi mi en afero
Elmontros. Nu, amikoj, ne atendu
Ni princon Ŝujskij; mi vin nun gratulas:
Batalo estos morgaŭ. (Foriras.)
Ĉiuj. Vivu Dmitrij!

Polo. Batalo! Ili havas kvindek milojn,
Kaj ni apenaŭ havas dekkvin milojn:
Li freneziĝis.
Dua. Nu, amiko: polo
Eĉ sola povas venki kvincent rusojn.
Kaptito. Vi venkos! En batal', fanfaronulo,
De unu eĉ forkuros vi rapide.
Polo. Se glavon havus vi, arogantulo,
Mi vin (montrante sian glavon) per tio ĉi ekhumiligus.
Kaptito. Ho, rusoj tute ne bezonas glavon:
Ĉu vi ne volas tion ĉi, sencerba!
(Montras pugnon. Polo fiere rigardas ĝin kaj silente foriras. Ciuj ridas.)

Arbaro.

Uzurpulo kaj Puŝkin.

(En malproksimo kuŝas mortanta ĉevalo.)

Uzurpulo. Ĉevalo malfeliĉa! Kiel vigle
Eksaltis ĝi hodiaŭ en batalon,
Vundita min rapide kiel portis.
Ĉevalo malfeliĉa!
Puŝkin (al si mem). Li bedaŭras
Ĉevalon, dum militistaro tuta
En polvon disbatita nun.
Uzurpulo. Aŭskultu,
Ĝi, eble, nur de vundo eklaciĝis
Kaj ĝi ripozos?
Puŝkin. Ne, ĝi malviviĝas.
Uzurpulo (iras al ĉevalo). Ĉevalo mia! Kion fari? bridon
Forpreni kaj deseli. Malviviĝu
En liberec'.
(Li deselas ĉevalon. Eniras kelkaj poloj.)
Sinjoroj, bonan tagon!
Sed kial mi ne vidas princon Kurbskij?
Hodiaŭ mi lin vidis en batalo;
Bravulon tuj ĉirkaŭis multaj glavoj,

Similaj je flekseblaj feraj spikoj;
Sed lia glavo levis sin plej supre
Kaj forta krio ĉion supersonis.
Li kie estas?

Polo. Oni lin mortigis.

Uzurpulo. Ho, estu paco al anim' kuraĝa!
Sed ni malmultaj post batalo restis!
Kozakoj, perfiduloj malbenitaj,
Krimuloj! vi, nur vi nin pereigis!
Eĉ tri minutojn ili ne eltenis!
Ni ilin punos: dekan mi pendigos!
Rabistoj!

Puŝkin. Iu estas, eble, kulpa,
Sed estas ni jam tute disbatitaj
Kaj ekstermitaj.

Uzurpulo. Sed afero povus
Tre bona esti; mi unuan vicon
Detruis, sed germanoj nin debatis;
Bravuloj ili estas! jes, bravuloj!
Por tio ilin amas mi; mi nepre
El ili kolegaron mian faros.

Puŝkin. Hodiaŭ kie ni pasigos nokton?

Uzurpulo. Jen tie ĉi, — en tiu ĉi arbaro.
Eliros frue ni; en Rilsk'on venos
Ni al tagmanĝo mem. Nu, bonan nokton.
(Li kuŝiĝas, metas selon sub kapon kaj ekdormas.)

Puŝkin. Agrablan nokton!... Tute disbatita,
Reĝido, per forkuro sin savanta,
Li, tute kvazaŭ knab', estas senzorga;
Kredeble Dio mem lin ĉiam gardas, —
Kaj ankaŭ ni, amikoj, ne malĝoju!

Moskvo. Reĝaj ĉambroj.

Boris, Basmanov.

Reĝo. Venkita estas li, sed ĉu ni havas
Utilon? ĝojis ni de vana venko.

Kolektis ree li militistaron
Kaj nin minacas de Putivlaj muroj.
Kaj kion do herooj niaj faras?
Ĉe Kromoj ili staras, kaj kozakoj
Je ili ridas nur el ĉirkaŭbaroj.
Jen gloro! Ne, ne estas mi kontenta;
Mi kiel estron — vin al ili sendos —
Ne genton, sed nur saĝon — vojevodon
Mi faros; ili pri rangec' malĝoju!
Jam tempo estas malestimi plendon
De eminenta gento de bojaroj
Kaj plej perean moron fordetrui.

Basmanov. Ho, reĝo mia! estu plej benita
Eterne tago, kiam rangajn librojn
Kaj kune ankaŭ kaj malpacojn ĉiujn,
Kaj fierecon gentan flam' ekstermos.

Reĝo. Jam tre proksima estas tiu tago;
Unue nur mi devas humiligi
Popolon.

Basmanov. Ho, ŝatinda ĝi ne estas!
Popolo estas ĉiam ribelema:
Ĉevalo vigla tiel mordas bridon,
Indignas tiel knab' potencon patran;
Ĉevalon do rajdant' direktas bone
Kaj patro ĉiam knabon ordonadas.

Reĝo. Ĉeval' rajdanton iafoje ĵetas,
Ne ĉiam ankaŭ fil' al patr' obeas:
Ni povas nur per severeco granda
Popolon teni. Tiel pensis ankaŭ
Johan', humiligisto de ventegoj,
Plej saĝa, plej potenca aŭtokrato,
Kaj ankaŭ lia furioza nepo.
Popol' favoron tute ne sentadas;
Vi faru bonon — ĝi ne diros dankon;
Vi rabu, batu — rezultat' egala.

(Eniras bojaro.)

Nu, kio?

Bojaro. Gastoj alilandaj venis.
Reĝo. Akceptos mi; atendu min, Basmanov,
Vi restu tie ĉi: kun vi bezonas
Paroli mi. (Foriras.)
Basmanov. Spirito alta reĝa!
Nur uzurpulon malbenitan venki
Lin helpu, Dio; li ankoraŭ multe
Da bono al Rusujo povas fari.
En lia saĝo bona pens' naskiĝis —
Ne volas mi, ke ĝi foriĝu. Kia
Por mi areno estos, kiam rompos
Li kornon al bojaroj altagentaj.
Mi konkurantojn en milit' ne havas;
Mi apud reĝa tron' unua staros. . . .
Kaj, eble. . . . Sed pro kio estas bruo?
Tumulto. Bojaroj, kortegaj servantoj kuras en senordo, sin renkontadas, kaj murmuretas.)
Unua. Al kuracisto!
Dua. Tuj al patriarko!
Tria. Reĝidon, li al si reĝidon vokas!
Kvara. Konfesprenanton!
Basmanov. Kio do fariĝis?
Kvina kaj sesa. Ekmalsaniĝis reĝo, reĝo mortas.
Basmanov. Ho, Dio!
Kvina. Li de tron' subite falis,
Ekfluis sang' el buŝ' kaj el oreloj.
(Reĝon oni elportas sur seĝo; tuta reĝa familio; ĉiuj bojaroj.)
Reĝo. Eliru ĉiuj, ĉiuj — kaj forlasu
Kun mi reĝidon solan. (Ĉiuj foriras.) Nu, mi mortas;
Ni kisu nin. Ho, mia fil', adiaŭ:
Tuj vi komencos reĝi. . . . Dio, Dio!
Al Vi mi tuj aperos — kaj animon
Ne estas tempo per konfes' purigi!
Mi sentas — filo, vi por mi pli kara,
Ol sav' anima estas . . . . tiel estu!
Subulo mi naskiĝis, kaj subulo
Mi morti ankaŭ devus en mallumo;

Jen tronon mi atingis — sed per kio?
Vi ne demandu. Vi ne estas kulpa,
Sufiĉe . . . Nun vi jam laŭ rajto reĝos,
Kaj sola mi al Dio mem respondos.
Ho, filo! ne forlogu vin malvere,
Kaj ne blindigu ankaŭ vin memvole.
En bruaj tagoj prenas vi potencon:
Tre, tre danĝera estas uzurpulo —
Per nom' terura estas li vestita.
De longa tempo en regado sperta,
Eltenis mi konfuzon kaj ribelon:
En timo oni antaŭ mi tremadis,
Perfido voĉon doni ne kuraĝis;
Sed vi — ne sperta, juna potenculo,
Sub forta fulmotondr' vi kiel regos?
Ribelon bruan kiel vi estingos?
Perfidon kiel vi de vi deturnos?
Sed Dio granda estas! Li junecon
Saĝigas kaj al malforteco donas
Li forton . . . Jen, aŭskultu: vi unue
Por vi elektu konsiliston bonan,
Fidindan, malvarmegan kaj maljunan,
Amatan de popolo kaj honoran
De gento glora inter bojararo —
Ekzemple, Ŝujskij. Por militistaro
Necesa estas lerta kondukanto:
Vi sendu Basmanovon kaj fortike
Eltenu plendon de bojaroj noblaj.
Vi de junec' kun mi en magistrato
Sidadis, scias vi regadon regnan;
Ne ŝanĝu vi iradon de aferoj.
Kutim' — animo estas de potenco.
Mi devis nun denove refarigi
Ekzekutadojn, malfavorojn — povas
Forigi ilin vi; kaj oni benos
Vin, kiel oni benis vian onklon,
Prenintan tronon de Minaca reĝo.

Sed poste iom vi post iom ree
Kuntiru forte regnajn kondukilojn;
Kaj nun vi povas ilin malfortigi,
El man' tamen ne tute forlasante.
Favora estu al alilanduloj,
En servon ilin kun konfid' akceptu.
Konservu religian regularon.
Silenta estu; reĝa voĉ' ne devas
Sin perdi tute vane en aero:
Ĝi, kvazaŭ sankta son', anonci devas
Aŭ grandan feston, aŭ malĝojon grandan.
Ho, filo! Vi eniras tiujn jarojn,
En kiuj sang' ondiĝas de virinoj.
Ho, gardu, gardu vi purecon sanktan
De virguleco kaj fieran honton:
Se iu en juneco plezuriĝi
Kutimis per malvirta sentameco,
En granda aĝo tiu malafabla,
Malforta, sangavida ĉiam estas,
Kaj lia saĝo tute mallumiĝas.
En familio estu ĉiam kapo;
Patrinon vi estimu, sed potencu
Vi mem: vi estas viro kaj regnestro;
Fratinon vian ĉiam vi amadu,
Ĉar sola restas ŝia vi gardisto.

Teodoro (sur genuoj). Ne, ne, vi vivu kaj eterne reĝu —
Popol' kaj ni sen vi pereos tute!

Reĝo. Finita estas ĉio — mallumiĝas
Okuloj miaj, jam malvarmon tomban
Mi bone sentas ....

(Eniras **partriarko, monaĥoj**; post ili ĉiuj **bojaroj; reĝinon** oni kondukas sub brakoj; **reĝidino** ploregas.)

Kiu tie estas?
Ha! sankta monaĥigo ... Jes, tre bone ...
Eksonis horo! Reĝo jam monaĥo
Fariĝas, — ĉerk' — ĉambreto mia estos.
Atendu, sankta patriark': ankoraŭ

Mi reĝo estas . . . Ho, bojaroj miaj!
Jen estas tiu, kiu min heredas, —
Al li potencon mian mi transdonas;
Al Teodoro ĵuru . . . ho, Basmanov,
Amikoj miaj . . . antaŭ ĉerk' petegas
Mi vin: al li fervore, vere servu!
Li tiel juna estas kaj senkulpa.
Ĉu ĵuras vi?

Bojaroj. Ni ĵuras.

Reĝo. Mi kontentas.
Pardonu do al mi erarojn, pekojn,
Ofendojn volajn kaj sekretajn . . . .
Estas
Mi preta jam, — aliru, sankta patro . . .

(Komenciĝas ceremonio de monaĥigado. Virinojn en sveno oni elportas.)

Tendaro.

Basmanov kaj Puŝkin.

Basmanov. Eniru, tie ĉi libere diru,
Kaj tiel sekve li al mi vin sendis?

Puŝkin. Al vi ĉiaman amikecon sian
Proponas li kaj plej unuan rangon
En Moskva regno.

Basmanov. Sed sen tio estas
De Teodoro mi jam starigita
Tre alte: de militistar' mi estas
Unua estro; li pro mi eĉ rangojn
Aristokratajn malestimis tute.
Al li mi ĵuris.

Puŝkin. Ĵuris vi al leĝa
De trono heredanto; sed se vivas
Pli leĝa? . . .

Basmanov. Ne, aŭskultu, Puŝkin: kial
Malveron vi parolas? Mi ja scias,
Li kiu estas.

Puŝkin. Litvo kaj Rusujo
Jam longe nomis lin „reĝid' Dimitrij“;

Sed tion ĉi mi tute ne defendas.
Ne ĝusta, eble, li Dimitrij estas,
Li estas, eble, ia uzurpulo;
Nur scias mi, ke frue, aŭ malfrue,
Sed Teodor' al li ekcedos Moskvon.

Basmanov. Dum mi defendas mian junan reĝon,
Ĝis tiu temp' li tronon ne forlasos;
Da regimentoj ni sufiĉe havas!
Per venko nur mi ilin kuraĝigos, —
Sed kontraŭ mi de vi eliros kiu?
Kozak' Karelo, eble, — eble Mniŝek?
Ĉu multaj vi? apenaŭ ja ok miloj.

Puŝkin. Eraris vi; eĉ tiom ni ne havas.
Mi diros eĉ, ke ni militistaron
Malbonan tute havas, ke kozakoj
Vilaĝojn rabas nur, ke ĉiuj poloj
Nur multe fanfaronas kaj drinkadas,
Ke rusoj . . . Eĉ paroli mi ne volas, —
Mi antaŭ vi malici ne deziras;
Sed ĉu ekscii volas vi, Basmanov,
Per kio ĉiam fortaj ni restadas?
Ne per militistaroj, ne per poloj,
Sed nur per opinio de popolo.
Memoras vi triumfon de Dimitrij,
Almilitadojn liajn tute pacajn?
Al li sen pafo, sen batalo ĉie
Sin donis obeeme ĉiuj urboj,
Kaj vojevodojn mem popolo ligis;
Vi vidis mem: ĉu viaj regimentoj
Kun li batalis tre volonte? Kiam?
Ankoraŭ apud Godunov! Sed nun?
Ho ne, Basmanov, tre malfrue estas
Disputi kaj inciti ree flamon
De tute finiĝinta jam milito:
Kun via saĝo kaj kun forta volo
Eĉ ne eltenos vi; pli bone estus,
Se vi unua donos plej prudentan

Ekzemplon kaj anoncos, ke Dimitrij
Regnestro leĝa estas, — estos bone,
Per tio lin vi tute kontentigos!
Vi kiel pensas?

Basmanov. Morgaŭ vi ekscios.

Puŝkin. Decidu.

Basmanov. Nu, adiaŭ.

Puŝkin. Vi pripensu.

(Li foriras.)

Basmanov. Jes, prava li, perfido maturiĝas;
Sed kion faros mi? Ĉu mi atendos,
Ke ribelistoj ankaŭ min kunligu
Kaj al Otrepjev donu? Ĉu ne estos
Pli bone, se mi antaŭvenos ilin
Kaj mem . . . Sed ĵuron, ĵuron mi perfidos!
Eterne perdos mi honoron mian!
Konfidon de junulo kronportanto
Mi pagos per perfido plej terura! . . .
Al elpelito estas tre facile
Ribelon kaj konspiron pripensadi;
Sed mi, sed mi, amato de regnestro. . . .
Sed mort' . . . potenco . . . de popol' mizeroj. . . .

(Li enpensiĝas.)

He! kiu tie estas? (fajfas) Nu, alvenu!
Ĉevalon! Kaj trumpetu tuj kolekton!

Ekzekutejo.

Iras **Puŝkin** ĉirkaŭita per **popolo.**

Popolo. Al ni reĝido jen bojaron sendis.
Aŭskultu, kion li al ni parolos.
Alvenu tien ĉi!

Puŝkin (sur tribuno). Regnanoj Moskvaj!
Saluti vin al mi reĝid' ordonis. (Salutas.)
Vi bone scias, kiel zorg' ĉiela
Reĝidon nian de krimulo savis;
Kaj li krimulon ekzekuti iris,

Sed Dia juĝo batis jam Boris'on.
Rusujo al Dimitrij humiliĝis,
Basmanov mem al li kun pent' fervora
Jam alkondukis siajn regimentojn,
Al vi Dimitrij iras ame, pace.
Ĉu levos glavon vi, pro kontentigo
Al familio de Boris', sur reĝon
Plej leĝan kaj sur nepon Monomaĥan?

Popolo. Sendube ne.

Puŝkin. Regnanoj karaj Moskvaj!
Vi ĉiuj scias, kiam vi suferis
Sub potencado de fremdul' kruela:
Depagojn, ekzekutojn, malfavoron,
Laboron kaj malsaton vi ekprovis.
Dimitrij do favori vin intencas,
Bojarojn ĉiujn kaj popolon tutan.
Ĉu estos vi obstinaj senprudente?
Ĉu vi forkuros de favoroj liaj?
Sed iras li sur Moskvan patran tronon
Ne sola, sed kun akompan' minaca.
Ne kolerigu reĝon, timu Dion!
Kaj ĵuru tuj al leĝa potenculo;
Ekhumiliĝu: sendu al Dimitrij
Vi patriarkon kaj bojarojn viajn,
Sekretariojn, elektitajn homojn, —
Salutu ili al regnesto — patro.
(Li foriras. Bruo popola.)

Popolo. Pri kio pensi? Li parolis veron.
Dimitrij vivu! vivu nia patro!

Vilaĝano (sur tribuno). Popol'! popol'! En Kremlon!
Reĝajn ĉambrojn!
Kaj ligu tuj hundidon de Boriso!

Popolo. (Rapide kuras en amaso)
Dronigi! ligi! Vivu reĝ' Dimitrij!
Pereu tuta gento de Boriso!

Kremlo. Domo de Boriso. Gardantoj apud perono.
Teodoro apud fenestro.

Malriĉegulo. Donu almozon, pro Kristo!

Gardantoj. Iru for! oni ne permesas paroladi kun enŝlositaj.

Teodoro. Foriru, maljunulo, mi estas pli malriĉa, ol vi: vi libera estas.

(**Ksenio** sub kovrilo aliras al fenestro.)

Unu el popolo. Frato kaj fratino — malfeliĉaj infanoj, — kvazaŭ birdetoj en kaĝo.

Dua. Kiun vi kompatas? Malbenita gento!

Unua. Patro estis krimulo, infanetoj do estas senkulpaj.

Dua. Pomo de pomarbo ne malproksime falas.

Ksenio. Frateto! frateto! Ŝajnas, al ni bojaroj iras.

Teodoro. Tio ĉi estas Golicin, Mosalskij. Aliajn mi ne konas.

Ksenio. Ha, frateto, koro formortas!

(**Golicin, Mosalskij, Molĉanov** kaj **Ŝerefedinov**; post ili tri pafistoj.)

Popolo. Disiru, disiru, bojaroj iras.

(Ili eniras domon.)

Unu el popolo. Kial ili venis?

Dua. Kredeble, ĵurigi Teodoron Godunov.

Tria. Efektive. Ĉu vi aŭdas, kia bruo estas en domo? . . . Tumulto! oni batalas!

Popolo. Ĉu vi aŭdas? Krieto! Tio ĉi estas virina voĉo. Eniru. . . . Pordoj estaj fermitaj — krioj eksilentiĝis — bruo daŭras.

(Pordoj sin malfermas. Mosalskij aperas sur perono.)

Mosalskij. Popolo! Mario Godunov kaj ŝia filo Teodoro sin venenis. Ni vidis iliajn malvivulajn korpojn. (Popolo en teruro silentas.) Kial do vi silentas? Kriu: vivu reĝo Dimitrij Johanoviĉ!

(Popolo silentas.)